


ESPERANTO



*La moderna haveno de Marsejlo, urbo de nia 42a
Universala Kongreso*

N-ro 612 (11)

Novembro 1956



REVUO INTERNACIA

Revuo Internacia

N-ro 612 (11)

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

Fondinto: H. HODLER

* * *

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

* * *

Ĉion por la redakcio oni sendu al la
Redaktoro: Mag. W. AULDKnockfarril, Thornsidge Road, Johnstone, Renfrew-
shire, Skotlando.

* * *

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo
ESPERANTO (abonado, reklamoj, anoncetoj)
sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASO-
CIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando.
Telefona: Rotterdam 128313. Ĝironto: 378964.

* * *

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj,
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian
represadon al nia redakcio.Jara abono (1956): 7.50 n.gld. (kun membreco kaj
jarlibro 10 n.gld.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

* * *

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo	128.— gld	1/2 paĝo	64.— gld
1/4 paĝo	32.— gld	1/8 paĝo	16.— gld
	1/16 paĝo	8.— gld	

Anoncetoj pri korespondado:0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkuponon por
ĉiu duon da vorto.**Legantoj en 80 landoj****Estraro de U.E.A.:**Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Ospedale
Maggiore, Parma, Italujo.Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario,
77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex,
Britujo.P. M. Mabesoone, vic-prezidanto, estrarano pri
financoj, Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O,
Nederlando.H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fille-
brook Road, London E 11, Britujo.R. Llech-Walter, estrarano pri kongresoj, 5 Quai
Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.D-ro Inĝ. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj
aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj
asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-
Hessen, Germanujo.**Centro de Esploro kaj Dokumentado**77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex
Britujo. Telefona: ARNold 90-81.**ENHAVO**

Fortan apogon al ISAE	161
Dekjara jubileo de UNESKO	162
Belarta Konkurso 1956	
Fluadoj. de Oyarzabal	163
Lernantino. M. Boulton	164
Piccarda. Dante (Dondi)	166
La tero. Aarestrup (Graversen)	166
Esperanto por infanoj. Gonin	168
Tie floras la Kongresurbo. Fighiera	169
La XXVla Kongreso de IKUE	170
Internacie plej oftaj vortoj	173

Rubrikoj	
La Juna Vivo	167
Tra la movado	168
CED	169
APO	169
Radio	170
La internaciaj konkursoj	172
Radio-Babiloj	172
Novaj Libroj	174
42a Universala Kongreso	175
Esperantista vivo kaj Nekrologo	176
Oficiala Informilo	176

RAPORTO PRI LA INTERNACIA KONGRESO DE „VIVANTA LATINO”

Tiu Kongreso okazis en Avignon (Francujo) de la 2-a ĝis la 6-a de septembro 1956.

Kiam Profesoro Lapenna skribis al mi dum junio, por peti de mi ĉeeston ĉe la Internacia Kongreso pri „Vivanta Latino”, mi akceptis, malgraŭ mia firma opinio ke mi perdos tempon kaj monon.

Sed tamen, mi pripensis la aferon, kaj alvenis al la konkludo ke ni devas esti tre atentaj pri tiaj kongresoj.

Do, mi aliĝis, kun mia filino Colette, anino de U.E.A., studentino ĉe la Fakultato de Montpellier, kaj petis U.E.F. sendi 150 diversajn literaturajn librojn al nia Delegito en Avignon, Samideano Motto, por organizo de Ekspozicio.

La Ĝenerala Sekretario de U.E.F. Samideano Ribot, venis kun sia edzino, kaj deĵoris plensukcese ĉe la Ekspozicio.

La unuan kunsidon de tiu Internacia Kongreso ĉeestis 160 partoprenantoj el 22 landoj; montriĝis ke la organizintoj de tiu Kongreso estas S-ro Edouard Théodore-Aubanel, eldonisto en Avignon kaj S-ro Jean Capelle, Eks-Rektoro de la Universitato en Nancy, ĝenerala Direktoro de edukado en Okcidenta Afriko.

La unua raportinto estis Profesoro Jean Bayet, Direktoro de la Franca Lernejo en Romo. Temis pri la latina gramatiko. Li agnoskas ke gramatiko kaj sintakso ne estas facilaj, kaj li diras ke la plej grava manko estas la artikolo! Li dezirus simpligon, sed, kiel fervora latinisto, li ne volas ke oni stumpigu la lingvon. — Vera problemoj sen solvo! —

Dum tri tagoj, oni aŭdis multajn raportojn, sed fakte, oni alvenas al la konkludo ke simpligon de la gramatiko la kongresistoj ne deziras, sed nur novan pedagogion kaj kelkajn konsilojn pri prononcado.

Mi parolis kun diversaj profesoroj. Ili diris al mi: „Estas tute absurde pensi pri Latino kiel internacia lingvo por ĉiuj! Latino restos la lingvo de la kulturo nur por elito!”

Vizitante nian Esperantan Ekspozicion, tiuj profesoroj aĉetis lernolibrojn, sed fakte, ili estis absolute mirigitaj pri la riĉeco de nia literaturo.

Post la legado de la raportoj, france aŭ latine, okazis diskutoj, sed neniam per latina lingvo, sed nur france, germane aŭ itale!!!

Ĉe la festeno (luksa), oni aranĝis tiamaniere ke ĉiuj samlandanoj estu kune, por bona interkompreniĝo!

Ĉar la organiza komitato ne akceptis raportojn pri Esperanto aŭ pri projektoj de internaciaj lingvoj, nia Samideanino Fraŭlino Bonnafous, Agregacia Profesorino pri Latina Lingvo en Liceo de Avignon, provis paroli pri Esperanto ĉe la ferma kunsido, sed okazis tiom da bruoj kaj krioj, vere indignaj de Asembleo de Rektoroj kaj Profesoroj, ke ŝi ne povis esti aŭdata.

FORTAN APOGON AL ISAE!

„Esperanto” jam registris la altnivelan aranĝon okaze de la 50-jara jubileo de Internacia Scienca Asocio Esperantista. Estas necese ankoraŭfoje forte emfazi la eksterordinaran gravecon de tiu ĉi organizaĵo por la progresigo de la Internacia Lingvo.

Dum sia 50-jara ekzistado ISAE havis en siaj vicoj centojn da fakuloj kaj specialistoj pri diversaj sciencaj branĉoj. Multaj el ili estis mondkonataj sciencistoj. Unu el la prezidintoj ricevis eĉ la altegan honorigon de la Nobel-premio. Alia estis prezidanto de la Franca Akademio de Sciencoj. ISAE regule eldonadis — kun kelkaj interrompoj pro specialaj kaŭzoj — altnivelan sciencan revuon. Ĝiaj membroj publikigis en Esperanto grandan nombron da sciencaj studoj, disertacioj kaj artikoloj, kiel ankaŭ plurajn verkojn. En la ISU ĉefe prelegas membroj de ISAE. Estis precize ĝi, kiu ebligis la eldonon, antaŭ kelkaj monatoj, de la Dua Volumo de Elektitaj Prelegoj de ISU. Ankaŭ multaj fakaj terminaroj ŝuldas sian aperon al talento kaj sindono de la esperantistoj-sciencistoj.

Per tiu laboro sur la scienca kampo ISAE kaj ĝia membraro konsiderinde kontribuis al riĉigo de la Esperanta faka kaj scienca literaturo, al evoluo de la lingvo, al disvastigo kaj popularigo de sciencaj konoj. Tio, siavice, helpis kaj helpas al ĝenerala altigo de la valoro de la Internacia Lingvo kaj al prestiĝo de la Esperanto-Movado.

Hodiaŭ ISAE bezonas la merititan apogon de ĉiu klera esperantisto. Ne por plue ekzisti — ĝia ekzisto feliĉe ja ne estas en danĝero — sed por ampleksigi siajn aktivecojn.

Unuavice ISAE bezonas multe pli da membroj kaj abonantoj al sia organo Scienca Revuo. Ĉiu esperantisto, kiu aktive laboras en kiu ajn branĉo de scienco, devus senprokraste aliĝi al la organizaĵo. Tiuj, kiuj iel interesiĝas pri sciencaj demandoj devus almenaŭ tuj aboni S.R. kaj tiel fariĝi ĝiaj regulaj legantoj. *) La artikoloj en tiu revuo, kvankam en ili estas traktataj sciencaj temoj, estas skribitaj ĝenerale en facila stilo, komprenebla al ĉiu iom klera persono.

Alia subtenenda eldono de ISAE estas la libro „Sciencaj Studoj”. Ĝin redaktas Doc. D-ro P. Neergaard. En la luksa verko de ĉ. 250 grandformataj paĝoj, troviĝos originalaj kontribuoj de la plej eminentaj sciencistoj-esperantistoj. La verkistoj ne nur rezignis pri kiu ajn honorario por siaj studoj, sed eĉ pluraj el ili kiel la unuaj mendis kaj antaŭpagis la libron. Pli da sindediĉo al la afero oni malfacile povas imagi! Nun estas necese, ke la aliaj imitu tiun ekzemplon: tuj mendi kaj antaŭpagi la jubilean verkon, tiel ke ĝi povu aperi kiel eble plej baldaŭ. *)

ISAE agas por Esperanto en la scienco kaj per Esperanto por la scienco. En tiu sia duobla rolo ĝi devas en la estonteco ĝui multe pli grandan helpon de ĉiuj, kiuj komprenas la signifon de tiu laboro por la estonteco de Esperanto.

Prof. D-ro Ivo Lapenna

*) Scienca Revuo aperas 4-foje en la jaro kaj la abonprezo estas 5 ned. guld. aŭ 1,50 USA dolaroj aŭ egalvaloro. La verko ISU — Elektitaj Prelegoj kostas 3,90 ned. guld. aŭ 1,10 USA dol. La revuon oni abonas kaj la verkon oni mendas ĉe la eldonisto J. Muusses, Purmerend, Nederlando, aŭ ĉe la Libroservo de UEA. La verko Sciencaj Studoj kostas 18 dan. kr., aŭ 18 br. ŝil., aŭ egalvaloro. Tiun libron oni mendas ĉe la sekretario-kasisto de ISAE Prof. D-ro Dušan Brikc, Sarajevo, Vojvode Putnika 118/V, Jugoslavio, sed la antaŭpagon oni devas sendi al s-ro Vagn Jørgensen, Martinus Rasmussensgade 21, Nyborg, Danujo. Poŝtkonto 215 12.

Feliĉe, la Ekspozicio de U.E.F. ludis sian rolon, kaj la gazetaro fervore raportis.

La venonta Kongreso pri „Vivanta Latino” okazos en 1958 en Bruxelles. Ni invitos la Kongresistojn, ne nur por

viziti esperantan Ekspozicion, sed ankaŭ por aŭdi prelegojn, ĉar, fakte, montriĝis ke multaj gravaj intelektuloj ne havas scivoleman menson kaj tute ne konas nian aferon.

René LLECH-WALTER

Dekjara Jubileo de UNESKO

La du grandaj mondaj militoj, kiuj trafis la homaron en la daŭro de la sama generacio, maturigis la penson, ke por konservi la pacon inter la popoloj ne sufiĉas politikaj traktatoj aŭ ekonomiaj interkonsentoj, sed ke estas necese atingi almenaŭ ĝis certa grado intelektan kaj moralan solidarecon de la homaro. Tial dum la pasinta milito la aliancanaj ministroj de edukado kunvenis plurfoje en Londono por pritrakti la fondon de speciala interŝtata organizaĵo, kies tasko estus akceli la idealon de monda paco per kunlaborado sur la kampo de edukado, scienco kaj kulturo. Speciale kunvokita konferenco en Londono, kun la partopreno de 43 ŝtatoj, decidis fondi la Organizaĵon de Unuiĝintaj Nacioj por la Scienco, Edukado kaj Kulturo, aŭ, mallongigite, U.N.E.S.C.O. laŭ la nomo de la Organizaĵo en la angla lingvo. La Konstitucia Akto estis subskribita la 16-an de novembro 1945, sed la nova Organizaĵo ekfunkciis la 4-an de novembro 1946, do precize antaŭ 10 jaroj, kiam 20 ŝtatoj ratifis la Akton kaj deponis siajn instrumentojn ĉe la brita registaro. Poste al ĝi aliĝis multaj aliaj ŝtatoj, tiel ke UNESKO hodiaŭ havas 76 membrojn.

La Konstitucia Akto deklaras, ke la „reciproka nekomprenejo inter la popoloj ĉiam estis, dum la daŭro de la historio, en la originoj mem de la suspektoj kaj malkonfido inter la nacioj, pro kio aliaj malkonkordoj tre ofte degeneris en militon”. La akto substrekas, ke la paco devas esti bazita sur la intelekta kaj morala solidareco de la homaro. Tial UNESKO favoros la interkomprenejon kaj interkoniejon de la nacioj donante sian helpon al diversaj organoj de amasa informado, antaŭigante la popolan edukadon kaj kontribuante al la disvastigo de la kulturo.

En sia 10-jara laboro UNESKO dediĉis grandan atenton al la baza edukado kun la celo forigi la analfabetismon el la mondo. Sur la kampo de naturaj sciencoj UNESKO multe helpis al inter-

nacia kooperado de sciencistoj. Ĝi studis la kaŭzojn de internaciaj tensioj kaj de rasaj antaŭjuĝoj. UNESKO publikigis aron de reproduktaĵoj de la plej elstaraj pentraĵoj en la mondo, prizorgis tradukojn el la araba, persa, hindaj, japana, ĉina, itala, hispana kaj portugala lingvoj en la pli disvastigitajn lingvojn kaj tiamaniere helpis al diskonigo de grandaj majstraj verkoj ĝis nun ne sufiĉe konataj. Estis organizitaj vojaĝantaj ekspozicioj. UNESKO iniciatis la Universalan Kopirajtan Konvencion, la Konvencion por la Protekto de la Kulturaj Valoroj en okazo de armita konflikto kaj plurajn aliajn internaciajn interkonsentojn. Nun estas preparata gravega verko: La Kulturhistorio de la Homaro. El aliaj gravaj aktivecoj de UNESKO estas menciinda la eldono de pluraj periodaĵoj, inter kiuj UNESKO-Courier okupas elstaran lokon.

Per la fama Rezolucio de la 10-a de decembro 1954 tiu ĉi plej grava interŝtata organizaĵo por kulturaj demandoj rekonis la valoron de Esperanto por la scienco, edukado kaj kulturo. En la Rezolucio estas akcentitaj sur la unua loko la rezultoj atingitaj per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj.

La fakto mem, ke UNESKO estas fondita kaj ke ĝi ricevis minimumajn financajn rimedojn por realigi almenaŭ parton de la grandaj taskoj en la sfero de kultura kunlaborado inter la nacioj, estas salutinda. La ĉefa manko de la nuna organizformo estas, ke UNESKO en siaj aktiveco, laboro kaj klopodoj dependas de la bona volo de suverenaj ŝtatoj. UNESKO ne estas supernacia, sed interŝtata organizaĵo. La ŝtatoj hodiaŭ protektas ĉefe siajn proprajn interesojn ankaŭ sur la kultura kampo. Tiuj ofte antagonismaj interesoj esprimiĝas, kompreneble, ankaŭ en UNESKO. Pro tio UNESKO povis ĝis nun kaj povos ankaŭ en la estonteco solvadi nur kelkajn, plejparte duagradajn kulturajn problemojn. Tio ne signifas, ke eĉ tia laboro ne estas

utila. Ĉiu laboro, eĉ la plej eta kaj modesta, kiu kontribuas al pli bona interkomprenejo inter la popoloj, estas subteninda. Tial Universala Esperanto-Asocio, kiu troviĝas en konsultaj rilatoj kun UNESKO, donas al tiu Organizaĵo sian helpon precipe rilate tiujn punktojn de ĝia programo, kiuj speciale interesas la Esperanto-Movadon. UEA donos tiun helpon ankaŭ en la estonteco kaj ĉiam pli insiste montrados ne nur al la organoj de UNESKO, sed ankaŭ al la ŝtatoj-membroj kaj al la larĝa publiko, ke ne estas eble atingi plenan kulturen kooperadon inter la popoloj sen antaŭa solvo de la fundamenta problemo — la venko de la lingvaj obstakloj — per neŭtrala, supernacia lingvo.

I. L.

Mallonge

Dum la lasta Internacia Kongreso de Radioterapio okazinta en la urbo Meksiko, de la 22a ĝis la 28a de julio, ĉi-jare, la reprezentanto de Brazilo, Dro. **Roxo Nobre**, prezentis tezon kies enhavo estis la uzado de la simboloj en Radioterapio, en la lingvo Esperanto. En sia tezo, D-ro. Roxo Nobre, kiu ne estas esperantisto, klarigas kial li decidis prezenti tiun tezon. Tio estas, post longa studado pri lingvoj el diversaj landoj kaj pri internaciaj lingvoj, li konkludis ke Esperanto estas la plej taŭga, por esti uzata en Radioterapio. Li kredas ke internacia lingvo devus esti uzata en Radioterapio por faciligi la laboron de la sciencistoj. La tezo estis presita en kvar lingvoj, inter ili, Esperanto.

★

Dum la kongreso en Kopenhago oni decidis reaktivigi la Tutmondan Esp. ĵurnalistan Asocion (sub la prezidanteco de d-ro F. Szilágyi). TEJA petas ĉiujn, kiuj havas ian rilaton al ĵurnalismo, komuniki al la suba adreso sian nomon, adreson kaj ceterajn informojn. La jara kotizo de TEJA estas 1 usona dolaro, kontraŭ kiu la organizo donos ne nur tiun utilon, kiu troviĝas en la organizo mem, sed klopodos ĝin ampleksigi laŭ la plej oportuna maniero. Adreso de la sekretario: Redaktoro N. Jepsen, Silkeborg Avis, Silkeborg, Danujo.

★

Nia observanto dum la 9a konferenco de UNESKO, Lic. **Tibor Sekelj**, estas esperantisto dum 25 jaroj. Dum tiu tempo li fondis **ok landajn asociojn**, krom pluraj dekoj da societoj!

★

La 2an de oktobro nia samideano Prof. H. H. Rissom en Hamburg-Berge fariĝis 90-jara. Gratulon!

Belarta konkursa 1956

Branĉo: Originala Poezio.

Unua Premio

Juan de Oyarzabal

Fluadoj

*Tra l' ĵendoj de la manoj
ĵaladas akvogutoj ĝis pavimo.
Kristalaj ĵiligranoj;
Konstanta, tinta rimo
de l' ada, monokorda kantesprimo!*

*Kaj estas ja turmento
ne povi sur la manoj ĝin reteni;
ne povi dum momento
la gutojn ĉirkaŭpreni
kaj l' akvon ĉe l' mankavoj jam kateni.*

*Sed ĵalas senkompate
sur plankon la persista gutĵadeno.
Ĵaladas ritmobate
la klara perloĉeno
kaj restas en la manoj nur malpleno.*

*Tra l' ĵlamoj de l' sunĵfino
Ĵarmadas tagogutoj ĝis tenebro.
Ni volus kun obstino
kun arda lumoĵebro
enĵfermi la tagbrilon sub palpebro.*

*Ho sorĉo de l' krepuskoj;
Ho ludoj karmezinaj kaj purpuraj
de l' ravaj lumembuskoj
miraĝaj kaj veluraj
sur tagoj kaj sur noktoj senkonturaj;*

*Sed larmas gurdopaŝe
la lanta, monotona tagoĵfluo.
La lum' ĵoriĝas kaŝe.
Ekregas noktiĵfluo
kaj restas en l' animo nur vakuo.*



*Tra l' vundoj de la koro
ĵuĝadas vivogutoj ĝis la ĵfino;
l' aromoj de la ĵloro,
la dolĉoj de la vino,
la larmoj kaj la kisoj de l' virino.*

*Ripozi sur la vojo
la koro jam avidas kun anĵhelo,
por ĵlaro de l' vivĝojo,
por trinko de la belo,
por sonĝi ĵor de lukto kaj kruelo.*

*Sed ĵuĝas vivogutoj
en teda kaj obtuza litanio.
Minutojn post minutoj
eliĝas iluzio
kaj restas en la koro nur nenio.*

Lernantino

de

Marjorie Boulton

Paŭlino faris lernejan hejmtaskon sur angulo de la tablo, en la kuirejo. La patrino, jam pretiginta kelkajn pasteĉojn por la vespermanĝo, finuzis sian paston, farante kelkajn tortetojn kun riĉkolora, brila frambo-konfitaĵo.

Paŭlino devis desegni mapon de Skandinavio, kaj surmeti la ĉefajn urbojn kaj riverojn. Ŝi ĝojis, ĉar ŝi devas desegni mapon; skriba hejmtasko postulas plenan atentadon; sed super la mapo Paŭlino povis iom revii, ŝia nuko, ŝiaj kreskantaj mametoj, ŝia buŝo, memoris tre pri Ralfo. Inter la tagmanĝo kaj la komenco de la posttagmezaj lecionoj, ili kaŝis sin en malproksima anguleto de la ludkamparo, post kelkaj arbustoj, kaj eksperimente, iom timeme, amindumis. Ralfo havis plurajn aknojn, kaj lia hararo ne estis tre bonorda; sed li estis mirinda, mirinda. Li ne volis instrui, nek korekti, nek reformi ŝin; li volis fari nenion por ke ŝi iĝu bona knabino; li nur volis tuŝi ŝin, kaj lia tuŝo estis frostosparkoj, nigraj fulmoj, amara vino, dolĉa marmelo kaj tiuj neĝaj steloj kiujn ŝi iam vidis per mikroskopo.

La frambo-konfitaĵo estis senspirige bela: rubenegoj en la pastrodoj. Tion ŝi neniam antaŭe rimarkis.

Paŭlino komencis borderi Skandinavion per blua krajono. La plimulto de ni konas la maron nur kie ĝi randas sur la teron; ni devas imagi la senrandan bluan. Norvegujo kaj Svedujo: sovaĝa virĉevalo kun ŝaŭma kolhararo el fjordoj. Ĝi eĉ havis bluan okulon, la grandan lagon, Venern. Stranga skuita besta kapo, inter la Atlantika kaj Arkta Oceanoj; hodiaŭ, strange pasia ĉevalkapo sur la papero. Mara virĉevalo, aŭ eble

la kapo de iu vasta, praa serpento kiu sin nodas ĉirkaŭ la terglobo, kies kapo kaj kolo leviĝas el la Arkta Oceano... Kaj Finnujo, la brusto ŝvela...

Paŭlino zorge rigardas la presitan mapon, por ĝuste lokigi la ĉefajn urbojn. Ŝiaj lipoj estas sekaj, ŝajnis koroditaj; odoreto de knaba ŝvito restis en ŝiaj naztruoj; ŝi ĝuste lokigis Oslo en la virĉevala kapo, dum la ventromuskoloj froste streĉiĝis pro volupto.

„Dum vi ne skribas, kara, eble ni povos interparoli” diris la patrino.

„E... jes?”

„Mi ĝojas, ĉar vi ĉiam venas hejmen akurate.”

Io avertis Paŭlinon, ia intuicio: la tempo por diri la veron al la nekomprenataj Aliaj jam estis forpasinta.

„Estus domaĝe, ne manĝi varmajn pasteĉojn, Panjo. Kion vi metis en ilin ĉi-foje?” — Parolu pri nenio ajn kiu gravas; vi nun estas en subtera movado; unu eraro povas perfidi vin.

„Viandon kun terpomoj, kaj iom da bona saŭco. Ili plaĉos al vi. Eble vi manĝos tri.”

„Tre eble.” Jen Stokholmo kaj Malmö sur la taŭzita mentono.

„Tamen, mi esperas ke vi ne amas vian hejmon nur manĝosranke.”

„Ho, ne.”

Paŭlino perceptis, ke ŝia patrino volas diri ion, estas iel ĝenita; sed ŝi ne volis helpi; ŝi eĉ timis helpi.

„Oni diras, ke kelkaj knabinoj el via klaso jam eliras kun knaboj.”

„Ĉu?”

„Eble vi ne scias; tiaj knabinoj ne parolos pri tiaj aferoj kun vi; ili scias ke vi loĝas en bona hejmo,

kaj ke tial tiaj stultaĵoj ne interesas vin. Kiam mi estis knabino, kelkaj lernejaninoj, fiaj knabinaĉoj, volis montri al mi bildojn... vi komprenas, aĉegajn bildojn, ĉar ili volis ŝoki min; kaj ili volis pruvi al mi, ke ili scias ĉion; sed mi venis el bona hejmo, kaj tute rifuzis rigardi. Sed vi scias, Paŭlino, ke ne ĉiuj knabinoj havas bonajn hejmojn.”

„Ne.”

„Sinjorino Braŭn parolis al mi pri kelkaj inter viaj knabinoj... eĉ en la lerneja uniformo... ili promenas kun knaboj, eĉ tenas la manojn... kaj ili estas nur same kiel vi... dekkvarjaraj, eble dekkvinjaraj... ĉiuokaze, multe tro junaj por koncerni sin pri stultaĵoj.”

„Mi sciis nenion pri ili.” Memorita kiso tiel fulmis sur la nuko, ke Paŭlino devis konscie silenti por ne spasme krieti. „Mi ne scias multon pri la klasaninoj, krom Marjo kaj Silvio; kaj ili ŝatas precipe la poŝtmarkojn kaj la broderion.”

La mapo estis preskaŭ finita; ŝi devis fari matematikan taskon; ŝi volas paroli kiel eble plej formale, tranĉite, seninterese; sed la patrino insiste volis paroli kun ŝi.

„Ne, mi esperis ke vi ne konas tiajn tipinojn. Mi nur timis, ke eble ili timigos vin per malbelaj konversacioj. Mi scias, ke vi neniam eĉ deziris aŭdi tiajn konversaciojn.”

Paŭlino memoris pri la demandoj de Ralfo. Certe, tiu konversacio ne estis malbela; ŝi ĝojis respondi vere, pri ĉio, pri kio li demandis; tio fakte estis iom bela, ĉar ŝi sciis, ke li ne ridos pri ŝi, li vere volas scii pri knabino.

„Ne”, ŝi diris seke.

„Mi scias, ke vi tute ne deziras eliri kun knaboj; sed pro tiu onidiro, mi kredis ke mi devas paroli kun vi. Vi sendube scias, ke viroj kaj knaboj havas apetitojn, kiujn ni ne sentas. Io besteca troviĝas en ĉiuj viroj, eĉ la plej bonaj. Kompreneble, edzino devas toleri tion, ĉar tia toleremo estas leĝo de la kristana kunvivado; sed bedaŭrinde multaj junulinoj ne komprenas pri la aliaj danĝeroj. Kaj, ĉar

ankaŭ ili, dum la nuna fia epoko, ne scias multe regi sin . . .”

Paŭlino, kun granda sinrego, sukcesis ludi oscedeton.

„Pardonon!”

„. . . io ajn povas okazi. Ili tiel similas al bestoj. Sed vi loĝas en bona, rafinita hejmo. Mi ne volas tro ĝeni vin, Paŭlino, parolante pri tiaj aferoj; mi scias, ke vi abomenas ilin, sed mi sentas la devon rekte averti vin. Se Io Okazas al malprudenta knabino, ŝi povas trafi la plej terurajn, hontindajn malsanojn, aŭ ŝi povas eĉ grave-diĝi.”

Paŭlino silentis kaj rigardis sian mapon. La patrino kvazaŭ elpremis siajn vortojn, dolore kaj embarase. La filino deziris ke ŝi silentu, aŭ almenaŭ lasu la temon. Paŭlino volis sole pripensi siajn sensmemorojn, kiuj tiel beligis ĉiutagajn objektojn. Sed la buŝo de la patrino tordiĝis pro naŭzo.

„Vi devas kompreni, Paŭlino: la viroj estas bestoj, ĉiuj. Kaj la kontaktoj en la geedza vivo estas treege proksimaj. Oni tute ne povus toleri ilin, sen spirita amo. Sed kelkaj virinoj estas malpuraj. Vi neniam faros ion malpuran, ĉu, Paŭlino? Vi scias, ke se oni komencas fari ion, la viro volas fari ĉion . . . Vi neniam trivialigos vin, ĉu?”

„Ne, Panjo.” Paŭlino lekis siajn lipojn, kiuj estis sekiĝintaj pro la nervostreĉa konversacio; la gesto tremetigis ŝin per ora memoro; la varma buŝo de Ralfo. La knabino jam sentis, ke tio ne estis trivialigo. Ŝi ankaŭ memoris kiel, kiam ŝi forpuŝis la manon de Ralfo, kiu ŝajnis al ŝi dum momento iom tro postulema, li diris, „Pardonon, ĉu tio malplaĉas? Mi ne faros plu.” Sed kial ŝi protestis? Ŝi nun sentis sin kvazaŭ perdita en la obtuza naŭzo de la patrino, en la eŭfemismo; ŝi sentis bezonon de reala scio. La patrino parolis pri abomenaj malpuraĵoj, dum la haŭto parolis per fulmo kaj parfumo. Estos absolute maleble, peti konsilon de la patrino. Ŝi ne komprenos la miraklon de tiuj karesoj, la novan ruĝon de la konfitaĵo, la belecon de la mapo.

Paŭlino fakte tre deziris peti

konsilon de iu. Ŝi volis dividi sian ĝojon, sian senton de nova vivo; sed ŝi ankaŭ volis ricevi regulojn pri la nova ludo kiun ŝi ne plene komprenis. Tamen, la Aliaj montris sian aliecon; ili ne povos helpi; ŝi devos trovi la propran vojon.

La patrino vidis la eksuferon en ŝiaj okuloj.

„Do, Paŭlino, mi ne volas mueli tiujn aĉaĵojn, sed mi deziris, ke vi certe sciu ĉion, kion knabino devas scii.”

Paŭlino faris la aliajn hejmtaskojn, vespermanĝis, helpis la patrino lavi la vazojn, trikis iomete dum ŝi aŭskultis radioprogramon. Plurfoje la ventraj nervoj telegramis, la kisitaj lipoj denove bruletis.

„Bonan nokton, Paĉjo; bonan nokton, Panjo.” Du sensignifaj kisoj. Paŭlino iris al la litĉambreto, senvestis sin, lavis sin, surmetis noktĉemizon, brosis la hararon centfoje, laŭ la rutino de pluraj jaroj. Iel Ralfo ĉeestis, tre bela kaj nobla sub siaj aknoj. Ŝi pensis pri revido, retuŝo . . . Sed nun ŝi devos zorge sekreti, ĉar la Aliaj malamas tiun paradizon.



Paŭlino malfermis la kurtenojn kaj malfunkciigis la lampon. Lunlumo inundis la ĉambron: froste arĝenta, metalece pika lunlumo, kies klingaj radioj preskaŭ dolorigis ŝin.

Stranga deziro naskiĝis en la junulino. Ŝi zorge riglis la pordon. Ŝi staris ĉe la fenestro, kun la mentono sur la dekstra pugno, kaj longe rigardis la lunon. Jes, ŝi dancos por Ralfo, por Ralfo kun la sankta, rivela lumo en la okuloj, juna Ralfo, kiu tiom deziras kompreni pri knabinoj. Ĉar Ralfo estis ankoraŭ kun Paŭlino; ŝi flaris lin en sia hararo, sentis lian manon sur la mamoj, liajn piedojn sur la piedoj, lian vangon varman kaj malglatetan sur la vango; li vive ĉeestis.

„Ralfo, Ralfo . . .” ŝi flustris al la lumo.

Paŭlino zorge demetis la noktĉemizon kaj staris nuda en la lunlumo. Ŝi levis la brakojn super la kapo, montris al la lumo la ŝvelajn mamojn, la vulkankratereton de la umbiliko, la femurojn; ŝi ekdancis. Ŝi dancis laŭ tre malrapida ritmo, malstreĉe, lukse banita per la mirinda lumo, kiu ŝajnis purigi ŝian karnon post la patrina leciono. Vidante sian moviĝantan korpon en la malhela spegulo, ŝi komprenis ke nuda virino estas bela, ne bezonas honti. En la spegulo, pro la malforteco de la lumo, ŝi aspektis kvazaŭ mitulino el alia mondo. Sed ŝi ne admiris sin, ĉar Ralfo restis kun ŝi. Ŝi dancis en la volupta malvarmeto de la noktoj; la lunradioj tuŝis la tutan korpon; ŝi cedis al ili kiel naĝanto al la maro, akceptante novan atmosferon. Ŝi aŭdis muzikon ne aŭdeblan al la matura paro en la najbara ĉambro, muzikon kiun ili aŭ forĝis, aŭ neniam aŭdis; kaj ŝi dancis laŭ la ritmo de tiu pramuziko.

Finfine ŝi reprenis la noktĉemizon kaj enlitiĝis. La kapkuseno iĝis la vango de Ralfo, la streĉita litkovrilo, liaj brakoj. Vasta taŭzita virĉevalo levis la kapon inter la Atlantika kaj Arkta Oceanoj; ĝi blekis; la lunlumo iĝis oceanaj ondoj, la ondoj iĝis bananta lumo.

Paŭlino ekdormis.

Branĉo: Traduka Poezio. Unua Premio

Piccarda

(Dante: Paradizo XXX 37-90)

Spirit' benata, kiu je la lumo
de l' viv' eterna la dolĉecon sentas,
kiu ne kompreneblas sen gustumo,
tre multe ĝojas mi, se vi kontentas
diri pri vi la nomon kaj la sorton,"
Kaj prete kaj ridete ŝi konsentas:
„Nia karit' neniam fermas pordon
al justa volo, kiel la Sublimo,
volanta sama al si jenan korton.
En mond' mi estis virga monaĥino:
se via menso en si bone gvatas,
ne kaŝos min plibelo de l' animo,
sed tuj en mi Piccarda vi konstatas,
kiu ĉi tie inter beatuloj
en plej malrapidanta sfer' beatas.
Nia spirit', flamanta je la bruloj
de la Spirito Sankta, en feliĉo
ĝojas pri ĝiaj enordig-reguloj;
kaj ĉi malalta stato, ĉi kondiĉo
al ni donita estas pro neteno
de voto aŭ pro ĝia malsufiĉo."
Tiam respondis mi: „En la sereno
de la vizaĝo io dia brilas,
pro kio aliigas la mieno:
tial memoro mia malsubtilas;
nun helpas tio, kion vi instruas,
tiel ke la rekono pli facilas.
Sed diru: kiuj tie ĉi situas,
ĉu ne aspiras do al loko plia,
kie pli vidas ili kaj pli ĝuas?"
Ŝi ekridetis kun la gent' alia,
kaj tiom gaje la respondo ekas,
ke ŝajnis ardi ŝi en flamo dia:
„Ho frato, nian volon plene regas
karita virt', pro kiu jena belo
satigas nin nek plian emon vekas.
Se ni aspirus al pli alta celo,
estus en malkonkord' niaj deziroj
de Li tenanta nin en ĉi ĉielo.
tion ne vidos vi en niaj giroj,
se nepras tie ĉi karita stato
kaj pri l' natur' vi pensas post ĉi diroj.
Estas formale al ĉi viv-beato,
ke ĉiam kun di-volo ni konkordas,
pro kiu unu iĝas nia ŝato:
kaj kiel ni de ŝtup' al ŝtupo ordas
en nia regn', al tuta regno karas
kaj al la reĝo, kiu ĝin agordas.

En lia volo nia paco staras:
ĝi estas maro, cel' de ĉiu ero,
kiun ĝi kreas kaj naturo faras."

Tiel mi vidis, ke en ĉiu sfero
troviĝas paradizo, kvankam graco
ne grandas laŭ la sama maniero.

El la itala: Enrico Dondi



Branĉo: Kongreslanda. Unua Premio

E. Aarestrup

La Tera

Kial celas daŭre vi al la ĉielo,
ne dankema homa malracia?
Jen — ankoraŭ junas mi
amoplena kiel vi;
miaj haroj floras kun printempa belo,
brilas en okulo larm' pasia.

Ĉu mi do meritas iĝi forgesata?
mi, kiu patrine ja vin benis
jam komence per trezor':
sana sango en la kor';
per birdara kanto dolĉe delikata
vian viveniron mi solenis.

Pentris vian vangon mi per ruĝa rozo,
vian frunton per lilio blanka.
Patrinece febla fort'
cedis sen severa vort'
al krudaĵoj viaj, al la furiozo,
al kaprico verva kaj junsanga.

Tage mi vin gardis kontraŭ suna brulo
per agrabla ombro duonhela.
En malluma nokta hor'
mi kun amo kaj fervor'
vin dormigis varte per kvieta lulo,
dum vin ŝirmis mia pelt' mantela.

Kiam la okulojn fermos vi ĉe-fine
kaj al lasta lito stumble lamos,
kun sincera emoci'
kaj zorgemo prenos mi
vian cindroreston, gardos ĝin en-sine
kaj per ĉarmaj floroj ĝin ornamos.

Kara, ĉu vi vere min forgesi povas
kaj alian amon alelekti?
Ho, amiko, kara fil',
venu hejmen kun trankvil'!
nur ĉe mia koro vi hejmecon trovas,
mi neniam ĉesos vin protekti.

El la dana: E. Graversen



LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de „L. J. V.” sendu al:

Nicola Minnaja,
Viale Giulio Cesare 223, ROMA, Italujo

AL ĈIUJ JUNAJ ESPERANTISTOJ

Karaj amikoj,

vi ja ĉiuj scias, en kiu grava kaj decida momento de nia agado por antaŭenigi niajn ideojn en la tuta mondo ni vivas. UNESKO oficiale agnoskis Esperanton kaj Universala Esperanto-Asocio ricevis la konsultajn aranĝojn. Malgraŭ ĉio ĝis nun atingita ni devas absolute kompreni, ke tio povas multe helpi niajn klopodojn, sed ke ni ankoraŭ devas multege labori, ĝis kiam almenaŭ kelkaj ŝtatoj oficiale enkondukos Esperanton en ĉiujn lernejojn por doni ekzemplon al la aliaj. Tial estas absolute necese kunigi ĉiujn fortojn de la Esperantistaro, por pli facile atingi tiun noblan celon. Pro tio Tutmonda Esperantista Junulara Organizo estas fondita kiel junulara sekcio de U.E.A., kaj same ĉiuj landaj asocioj kaj lokaj grupoj havu junularajn sekciojn. Per tiu nova organiza formo, plene bazita sur la federaciisma principo, ĉiuj junaj Esperantistoj havos la eblecon, pli bone kunlabori, kaj tiuj, kiuj ankoraŭ estas malpli ol 21-jaraj, ricevos rabaton de 50 % fariĝante individua membro de U.E.A. kaj do samtempe nia individua membro.

Karaj amikoj, formu do novajn rondojn de fervoraj batalantoj en la kadro de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo kaj anoncu vian kunlaboron, kaj neniam forgesu, ke ni junaj Esperantistoj

iam devos transpreni ĉiujn taskojn de la Esperanto-movado.

Günther Becker, Prezidanto

EL LA DECIDOJ

DE LA KOMITATO

Junulara Sekcio de U.E.A.: Traktata estas la raporto kaj rezolucio de la Tria Sekcio. La Komitato kompreneble havas grandan simpatian por la iniciato. Estas unue afero de la junularo realigi la iniciaton kaj krei la junularan organizon. Nur kiam ĝi ekzistos, U.E.A. povos konsenti al ĝiaj membroj kelkajn favorojn. Post diskuto en kiu partoprenis s-roj Perrenoud, Dahl, Rajski, Lapenna, Thollet, Reuchlin kaj aliaj estis decidite, ke membroj de la junularsekcio pagos duonan kotizon de individuaj membroj ĝis aĝo de 21 jaroj. Ĝiaj membroj povos fariĝi delegitoj speciale por junularo ekde la aĝo de 18 jaroj. Ne estos eble en la nunaj kondiĉoj konstante doni unu tutan paĝon en la revuo, sed decidite estas, ke la sekcio havu sian propran rubrikon en la revuo de U.E.A. En statuto kaj regularo estos faritaj la adekvataj ŝanĝoj. Ne necesos nomi kategorion „Junulardelegitoj” en la statuto. Sufiĉas aldoni al par. 21: „aŭ aliaj delegitoj”.

El la protokolo de la Komitatkunsido.

LA 12-a INTERNACIA JUNULAR-KUNVENO EN BÜSUM

Sub la honora protekto de Lia Moŝto Pastoro Nicolaus Christiansen, prezidanto de la Germanaj Popolaltlernejoj, disvolviĝis de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto en la nordmara banloko Büsum (Germanujo) la 12-a IJK de TEJO, kiun partoprenis proksimume 300 gesamideanoj, grandparte junaj, el 15 landoj.

La urbestro de Büsum, samtempe direktoro de la tiea Banloka Administracio, s-ro Hans Ohlen, per bela Esperanta parolo malfermis la kunvenon kaj bonvenigis la partoprenantojn; la solena malfermo, kiel ĉiuj plej gravaj kaj oficialaj eroj de la programo, okazis en la luma Strandhalo, ĝentile disponigita de la Banloka Administracio. Post la salutvortoj de la delegitoj de la diversnaciaj reprezentantaroj kaj post la festparolado de s-ro Friedrich Kraus, pioniro de la germana movado, la malferma kunsido fermiĝis sur la strando, aŭ pli bone sur la „Watt” (mi proponus „tajdgrundo”), kie internacia juĝantaro elektis inter la pluraj belulinoj la „Watt”-reĝinon, f-inon Britta Rasmussen. La

samtagan vesperon ĉiuj partoprenantoj renkontiĝis en la hotelo „Dithmarscher Haus” por la kongresa balo, kie ilin vizitis la Nordgermana Radio: la dissendo, en kies fono aŭdiĝis la gaja dancmuziko, estis la plej propagandefika el la 4, kiujn la Nordgermana Radio dediĉis al la IJK, precipe pro la konvinkaj vortoj de s-ro Pfütze, UEA-delegito en Büsum kaj fondinto de la tiea grupo „Junaj Esperantistoj”.

Estas neeble detale paroli pri ĉiuj amuzaj, kulturaj kaj organizaj aranĝoj; en ĉiuj brilis plej vigla juneca spirito, kiu imponis en la senprogramaj vesperoj: ĉiuj amuziĝemaj kaj amuzemaj grupoj donis sian improvizitan simpatian kontributon, kreante amikan internacian atmosferon; tiuj senprogramaj vesperoj devus troviĝi en la programo de ĉiuj IJK. La laborkunsidoj estis eksterordinare fruktodonaj, ĉar en ili estis planataj la decidoj de la kopenhaga Tria Sekcio, al kiu la IJK sendis oficialan sepmembran delegitaron. Prof. Canuto, rektoro Vilki kaj redaktoro Teo Jung per siaj prelegoj plialtigis la kulturan nivelon de la aran-

La rezolucio

de la tria sekcio

La Tria Sekcio „Esperanto kaj Junularo” de la 41-a U. K.

konsiderante la neceson, altiri al Esperanto ĉiam pli larĝajn tavolojn de la junularo kaj doni al la Esperantista junularo unuecan organizan formon,

submetis al la Komitato de UEA ĉi tiun proponon:

1. La esperantista junulara movado estu organizata en lokaj junularaj grupoj, landaj junularaj asocioj kaj internacia junulara asocio.

2. La landaj junularaj asocioj estu sekcioj de la landaj asocioj aliĝintaj (aŭ nealiĝintaj) al U.E.A.; la junaj individuaj membroj de U.E.A. estu la individuaj membroj de la internacia junulara asocio.

3. U.E.A. fiksus apartan kotizon por siaj junaj MJ kaj MA.

4. Juna membro estu malpli ol 25-jara; estrarano povas esti pli aĝa.

5. La internacia junulara asocio havu sendependan estraron kaj ĝeneralan aŭtonomecon laŭ difinita regularo.

6. La revuoj de U.E.A. kaj de la landaj asocioj enhavu junularan parton redaktatan de la internacia junulara asocio kaj de la landaj junularaj asocioj.

7. U.E.A. kreu novan kategorion de delegitoj, la junularaj delegitoj (JD), kun aĝo ek de 18 jaroj.

8. La internacia junulara asocio aranĝu propran ĉiujaran internacian junularkunvenon kaj komunajn internaciajn renkontiĝojn kun neesperantistaj junularorganizaĵoj.

9. La internacia junulara asocio organizu servojn por la interrilatoj de diversnaciaj gejunuloj kaj tiucele kunlaboru kun la koncernaj neesperantistaj organizaĵoj.

Por ke ĉi tiu propono havu kiel eble plej rapide kaj regule sian plenumon, la Tria Sekcio, elektis sepmembran komitaton, kiu fiksus la regularon de la priparolita internacia junulara asocio kaj energie antaŭenpuŝu ĝian efektivan ekfunkciadon.

Membroj de tiu komitato estas elektitaj: Günther Becker (Sarlando, prezidanto), Heinrich Reiter (Aŭstrujo, vicprezidanto), Richard Reuchlin (Germanujo, vicprezidanto), Nicola Minnaja (Italujo, ĝenerala sekretario), Paul Ciliga (Francujo), Gian Carlo Fighiera (KKS), Ben Van Moorst (Nederlando). Estas decidite, ke la nomo de la asocio estu **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO)**.

Ĝoj, kaj la Eŭropa Vespero direktata de s-ro Herrmann digne kompletigis per torĉa procesio la manifestacion.

La brilan sukceson de la Kunveno oni ŝuldas ankaŭ al la senlaca laboro de la LKK, al kies prezidanto Claus Ohlen flugu la sincera danko de ĉiuj partoprenintoj.

N. M.

Tra la monado

Marjorie Boulton, nia eminenta verkistino, faris post la 41-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago viziton en Svedujo kaj laŭtlegis proprajn poeziaĵojn, plejparte novajn, antaŭ la kluboj en Hälsingborg, Malmö, Stockholm, Uppsala kaj Skövde.

Dum la S.A.T.-kongreso en Beograd estis akceptata la propono organizi la sekvontan S.A.T.-kongreson en 1957 en Rotterdam. Formiĝis tie O.K.K., kies sekretaria adreso: f-ino A. C. Obbes, Boezemlaan 24, Rotterdam (N.).

Esperanto en Cejlono. De junio 1956 la monata revuo JAYANTI aperante kiel organo de la Budhana Konsilantaro de Cejlono, fako de la Ministerio por la Kulturaj Aferoj, publikigas serion da artikoloj pri Budhismo en Esperanto. Verkitaj kaj redaktitaj de la bone konata Sanghano C. Njanasatta, delegito de U.E.A., ĉi tiuj artikoloj montras, ke Esperanto estas nun oficiale akceptata de la cejlonaj instancoj, kiel universala lingvo en la tutmonda budhanaro.

La 36-paĝa angla revuo JAYANTI, abunde ilustrita, bele presita, aperigas temojn de mondfamaj kleruloj pri Budhismo, budhista kulturo kaj arto. Petu sciigojn pri abono kaj ekzempleron kontraŭ tri respondkuponoj de: La Ĝenerala Sekretario, The Lanka Bauddha Mandalaya, P.O. Box 552, Colombo, Ceylon.

Sciemuloj pri la orienta penso kaj interesatoj pri la Budha filozofio, legu „LA BUDHA LUMO”, organon de la Budhana Ligo Esperantista. Aperas trimonate. Jarkotizo: tri ŝil. Turnu vin al: „Clarach”, Abbey Drive, Gronant, Prestatyn, North Wales, Britujo.

En la plej granda vesperjurnalo „Aftonbladet” de Svedujo oni publikigas senpage korespondpetojn de eksterlandaj korespondemuloj. Bonan okazon por esperantistoj montri al la ekstera publiko la vastan uzadon de esperanto en la internacia korespondado. Tial ni petas la nesvedajn esperantistojn kiuj deziras korespondi kun svedoj, samtempe kun sendo de via korespondpeto al la sveda esperantogazeto „La Espero”, sendu ankaŭ al la menciita vesperjurnalo vian korespondpeton.

Adreso: Ett ögonblick redaktörn: Aftonbladet, Vattugatan 12, **Stockholm 1, Svedujo.**

De la 1-a ĝis la 5a de septembro okazis en Massa la 27a Kongreso de italaj esperantistoj: ĉeestis 450 samideanoj. La Solena malfermo havis lokon en la Duka Palaco. La kongresanojn salutis la Provincestro D-ro **La Selva**, la prezidanto de la Provinca Administracio D-ro **Orlandi**, kaj la Urbestro Adv. **Cecchieri**.



Oficiala Malfermo de la 17a Kongreso de Hispanaj Esperantistoj.

ESPERANTO POR INFANOJ

La deviga instruado de Esperanto en eĉ nur dek procent de la unuagradaj lernejoj de la mondo ne estas matura afero: por ĝi mankus la necesaj kapablaj instruistoj, kaj verŝajne inter la multaj ekzistantaj lernolibroj, ni ne trovus, post forĵeto de tiuj, kiuj enhavas lingvajn erarojn, aŭ kiuj tute ne respondas al la normoj de la nuna pedagogio, sufiĉan kvanton da taŭgaj instruiloj. Sed mia hodiaŭa intenco ne estas pritrakti tiujn du gravajn problemojn.

Nur pri tiuj infanoj, kiuj jam nun lernas la helplingvon en sia familio aŭ en la lernejo, mi deziras paroli.

Instruistojn jam trovis tiuj infanoj; lernolibrojn ja ne bezonas tiuj, kiuj lernas en la familio antaŭ la lerneja epoko. Sed tiu instruado postulas aliajn kondiĉojn. Ĝi povas sukcesi nur, se la gepatroj aŭ instruistoj mem flue parolas la helplingvon. Nia naŭjara filo eklernis Esperanton preskaŭ samtempe kiam la gepatran lingvon, kaj tion li faris kvazaŭ senkonscie pro tio ke hejme mia edzino tre ofte parolas Esperanton kun mi. Sed lerni ne sufiĉas, kaj tiu instruado restus senutila, eĉ foje malutila, se ĝi ne estus akompanata de praktika uzado en rilato kun la ŝatoj de la interesuloj. Mi kelkfoje ne povis sekvi infanojn de mia lernejo, al kiuj mi instruis Esperanton ekster la oficialaj horoj, kaj iom post iom ili forlasis Esperanton. Korespondado kun eksterlandaj infanoj ja estus tre taŭga rimedo precipe, se ĝi estas racie influata. Renkontiĝo kun alilandaj esperantistoj, sed speciale samaĝaj, ankaŭ estas tre efika, kaj oni devas klopodi por ĝin atingi. Pri ĉi ĉio Esperanto povas venke konkuri kun la ceteraj lingvoj.

Bedaŭrinde oni ne povus diri la samon pri ĉiuj ceteraj punktoj. Kiel instruisto mi profesie instruadas najbarlandan nacian lingvon, kaj mi havas okazon sperti, kompari. Por instruado de naciaj lingvoj,

ni havas ne nur tre bonajn lernolibrojn, kiuj ja multe profitas el la konkurenco inter lingvoj, aŭtoroj, eldonistoj, sed ni povas firmigi la metodon, ilustrati la instruadon per tradiciaj ludoj, folkloraj kantoj kaj legendoj aŭ fabeloj, riĉa literaturo originala en prozo aŭ en versoj, speciale verkita por infanoj aŭ almenaŭ speciale kolektita por ili en bonaj libroj kun tre taŭga klasifiko kaj ilustrado. Nu, kiu povus pretendi, ke Esperanto en la nuna tempo, kapablas rivali kun la naciaj lingvoj? Tradiciajn ludojn, folklorajn kantojn kaj rakontojn ni ja ne havas, kaj verŝajne ne povas havi, escepte sub formo de tradukoj, kiuj ĝis nun estas ege malmultaj aŭ ofte netaŭgaj. Literaturan ni ja havas, precipe tradukan sed tamen ankaŭ originalan. Bedaŭrinde ni devas konfesi, ke la Esperanto-literaturo estas ankoraŭ mizere malriĉa, mankhava, rilate al tio, kio vere taŭgas por infanoj.

Nun mi volus doni al mia artikolo pozitivan konkludon, kaj ĝin mi faros sub formo de alvoko. Mi solene kaj grave petas la kapablajn verkistojn, la talentajn poetojn, ke ili ne forgesu la infanojn, ke ili dediĉu al tiu interesa gento ankoraŭ nekapabla verki por si mem kaj avida legi kaj lerni, tutajn librojn, aŭ almenaŭ tutajn rakontojn aŭ poemojn, aŭ partojn de rakontoj kaj poemoj. Mi solene kaj grave petas la eldonistojn, ke ili nepre aperigu allogajn eldonaĵojn kun klara preso kaj freŝaj bildoj; mi solene kaj grave petas la responsajn gvidantojn de la Esperanto-movado kaj simplajn esperantistojn, ke ili helpu la verkistojn, la eldonistojn kaj do kune la infanojn, subtenante tiujn klopodojn per sia influo kaj per aĉetado, diskonigo de la libroj.

Ĉu la gepatroj kaj geinstruistoj de Esperanto-parolantaj infanoj ne samopinias kiel mi?

R. GONIN

Tie floras la kongresurbo

Mi amas vin, Francujo, lando de suno, belo kaj ĝojo. Ĉio, kion Dio donis al la homoj por ke ilia vivo fariĝu pli nobla, pli alta, pli spirita, abundas en vi. Vi, gloro de arto, fonto de kulturo, lando de tradicioj! Ne ekzistas koloro, kiun mano de artisto pentru, nek formo, kiun skulptisto fiksi en eterneco, nek sono ripetebla de virtuoza, nek dolĉeco, kiun poeto verŝu en ritmojn, kiu ne apartenas al vi.

Mi promenas en viaj regionoj kaj ne trovas komparon al via romantika vizaĝo. Kie aliloke neĝkovritaj montoj kaj freŝaj ebenaĵoj, helaj akvoj kaj ombraj arbaroj kune parolas al la animo, kiel sub via senlime blua ĉielo?

Mi amas vin, dolĉa Provenco, inspiro de Daudet kaj de Mistral. Eŭropo kuŝis en mallumo, kiam ĉe vi poezio regnis kaj viaj trobadoroj kreis du grandajn literaturojn. Sur viaj deklivoj olivarboj kaj romaj konstruaĵoj sin miksas triumfe kun gotiko, renesanco kaj moderno. Sub via vibranta lumo.

De dudek kvin jarcentoj vi rigardas, Marseille, trakuri la akvon en la Mediteraneo. Vi serene vidis triumfi kaj velki la grandajn civilizojn, kiujn la homoj kreis ĉirkaŭ vi. Vi restis, simbolo de universala latineco, por montri al la mondo, ke ĉe vi amalgamiĝas du kontinentoj kaj vivas pace kaj libere rasoj kaj religioj. Mi spiras vian intensan vivon, vian bruon, vian feliĉon kaj ĝojas, ke la plej humila el viaj enloĝantoj estas reĝo ĉe vi, Marseille.

Gian Carlo Figliera

DONACOJ POR CED

	£	s	p
Stato je la 31-a de majo 1956	102	2	0
Supera kurso de la Londona Esp. Klubo, Britujo	1	12	9
Esperanto-societo ĉe la „Ausland-Instituto Dortmund“, Germanujo	0	16	10
CDEL, Danlando	3	1	11
Universala Ligo, Nederlando	1	8	2
S-ro O. Rieckhoff, Germanujo	0	6	2
Gesinjoroj Laurie, Britujo .	1	0	0
D-ro José Roberto Vivas, Venezuelo	7	2	1
D-ro R. Zaballos Morales .	0	9	4
Stato je la 3-a de okt. 1956	118	0	3

Al ĉiuj donacintoj plej koran dankon. Donacojn por CED oni povas sendi al UEA, 7, Eendrachtsweg, Rotterdam C, Nederlando; al Unuiĝo Esperantista Franca, 34, rue de Chabrol, Paris X, Francujo; aŭ al CED rekte je la adreso de ĝia direktoro, 77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Britujo.

APO AGADO EN PROKSIMA ORIENTO

En Israelo

De la 1-a de julio ĝis la 18-a de septembro mi laboris en Israelo kiel speciala sendito de UEA.

Israelo estas laborkampo kun specifaj problemoj. Ĉiu klera israelano scias pri Esperanto kaj ĝia iniciatinto, kaj ekzistas tie 200 registritaj esperantistoj, kaj almenaŭ tiom da neregistritaj. Tamen E-grupo ekzistas nur en Tel Aviv, kaj la laboro de la Ligo konsistas nur el la organizado de jaraj kunvenoj. Tri ĉefaj malhelpaĵoj baras la vojon al la progreso. 1. Malkonsento de kelkaj aktivuloj kun la ceteraj gvidantaj samideanoj; 2. la argumento, ke en Israelo la vivo estas tiom malfacila, ke post la laboro oni jam ne povas sin okupi pri ideala movado, kaj 3. la konvinko, ke E-on estas neeble propagandi en Israelo, ĉar tie jam ekzistas unu lingvo problemo, tiu de la enkonduko de la hebrea lingvo.

Mi vizitis esperantistojn kaj faris plurajn kunvenojn en Tel Aviv, Jerusalemo, Hajfa, Naharya, Ako kaj Tivon. Baldaŭ okazos kunveno por glatigi la malkonsenton inter la ĉefa grupo kaj la malkontentuloj. Krome mi klopodis konvinki la gesamideanojn, ke la vivbatalo ĉie estas malfacila, sed ke multaj homoj tamen fervore laboras por E. Kaj fine, mia plej malfacila tasko estis konvinki la esperantistojn, ke la hebrea estas la nacia lingvo, kaj E. la internacia, kaj ke ili absolute ne konkurencas unu al la alia. Espereble mi sukcesis ankaŭ en tio.

La israelaj gesamideanoj promesis al mi okazigi propagandprelegojn kaj kursojn en almenaŭ kvar lokoj, klopodi fondi almenaŭ tri novajn societojn, regule kunvenadi kaj ĝenerale pliaktiviĝi. Krome dum mia ĉeesto la Ligo petis sian aliĝon al UEA, kaj invitis Universalan Kongreson al Israelo por 1958, afero pri kiu ankoraŭ la Estraro devas diskuti. Senkonsidere ĉu la Kongreso okazos tie aŭ ne, la invito mem signifas promeson kaj emon pri plivigliĝo de la Movado. Ni fondis informan fakon de la Israela E. Ligo, kiun prizorgos Sro Itamar Even-Zohar.

Aliflanke, ankaŭ en Israelo mi malvolvis sufiĉe aktivan „diplomatian“ laboron. Kune kun s-ro J. Koen-Cedek mi vizitis la Prezidanton de Israelo, S-ron Jichak Ben Cvi, dufoje. La duan fojon li invitis nin. Post ampleksa pridiskuto de la temo li deklaris la jenon: „Mi simpatias kun la ideo de la internacia lingvo. Se mi jam ne povas paroli en hebrea lingvo kun la fremdaj diplomatoj, mi preferus kun ili paroli en Esperanto, ol en iu ajn nacia lingvo. Kiam en kompetenta kunveno oni diskutos pri ĝia enkonduko, ni certe favoros ĝin. Intertempe propagandu kaj instruu ĝin al la popolo.“

Same simpatie esprimis sin D-ro Avidor, ĉefo de kabineto de la Edukministerio, kaj reprezentanto de Israelo en la Unesko-konferencoj, kaj D-ro Alon, ĉefo de la sekcio Internaciaj Rilatoj, de la Ministerio por Eksteraj Aferoj, kaj ambaŭ donis al mi tre valorajn ideojn por la plua evoluo de nia afero.

En Hajfa mi havis du longajn konversaciojn kun la ĝenerala sekretario de la Bahai-movado. Mia intenco estis konvinki lin, ke ili oficiale agnosku, ke la „internacia lingvo“, pri kiu la fondinto de tiu religia movado, Baha Ullah parolis, estas definitive Esperanto, kaj tiel devigu siajn du milionojn da membroj lerni kaj uzi ĝin. Niaj konversacioj ne alvenis al finaj decidoj, sed la pordo restis malfermita al pluaj paŝoj. La ĝenerala sekretario, s-ro Ioas, estas mem estinta esperantisto, kaj simpatias kun nia afero.

Dum mia ĉeesto la gazetaro publikigis 12 intervjuojn kaj artikolojn, kaj kvin radio-intervjuoj estas faritaj, en kiuj oni parolis ankaŭ pri Esperanto, same kiel okaze de la 14 publikaj prelegoj kiujn mi faris en diversaj urboj, en kiuj ni aranĝis, ke ĉiam iu samideano faru demandon en E., al kiu mi respondadis en E., same kiel mi faris en pluraj aliaj lingvoj. Krome, en Hajfa mi faris du prelegojn en la Internacia Lingvo.

Dum tiuj tri monatoj F-ino Parson, kunlaborantino de APO, gvidis kurson en Istanbulo, kiun sukcese finis 15 gelernantoj.

Mia proksima laborkampo estas Hindujo.

Sep mil longaj dezertaj kilometroj da vojo min atendas. Mi scias modeste vivi, sed mia nigra ĉevaleto tre ŝatas la benzinon, kaj ankaŭ la hotelestroj havas la malbonan kutimon prezenti fakturojn. Pro tio mi sincere dankas al la kelkaj bonvolemaj donacintoj de monsumoj al APO (laŭ kvitancoj publikigataj en „Esperanto“), kiuj estas vere bonvenaj, ĉar neniun alian subvencion mi havas, kaj la vivtenado estas kelkfoje ege malfacila, malgraŭ miaj spertoj kaj lerteco tiurilata. La fakto ke mi reprezentos UEA dum la UNESKO-Konferenco en New Delhi, eble pensigos ankaŭ aliajn gesamideanojn pri la ebleco de kunhelpo.

Istanbul, sept. 1956.

Tibor Sekelj

Ĉeĥa violonĉela virtuoza D-ro Pravoslav Sádlo-Páv, kun vasta repertuaro, serĉas koncert-proponojn. En kvarlingva prospekto nia samideano atentigas: „Ko-

respondado en Esperanto plej ŝatata“. Interesiĝantoj sin turnu kun proponoj al: D-ro Pravoslav Sádlo-Páv, Kremencova 15, PRAHA II, Ĉeĥoslovakio.

La XXVla. KONGRESO DE I.K.U.E. EN ZARAGOZA

Kiel anoncite, dum la tagoj 20/24 de Julio, en la bela hispana urbo Zaragoza, efektiviĝis tiu-ĉi Kongreso kiu havis rimarkindan sukceson.

La ĉefepiskopo de Zaragoza, Monsinjoro Casimiro Morcillo, persone prezidis la Kongreson, kiel veterana, aktiva esperantisto. La urbaj aŭtoritatuloj estis vere interesitaj kaj tre afable helpis al la granda sukceso.

La solena malfermo de la Kongreso okazis en belega salono de la Provinca Palaco, sub la prezido de Monsinjoro Casimiro Morcillo, kune kun la estraro de I.K.U.E. Post la bonvenaj vortoj de Dro. F. de la Puente, Prezidanto de la Org. Komitato, sekvis interesege parolado de Pastro A. Beckers.

Sro. P. Marqueta, kongres-sekretario, legis la ĵus ricevitan telegramon el Vatikano, el la Sta. Papo Pio XII. Tekstis jene:

Moŝta pontifiko dankante filajn sentojn partoprenantoj Katolika Kongreso Esperantista rekompence sendas abundajn donojn kaj ĉielan apostolan benon.

Oni legas la salutojn ricevitaĵn el la malproksimaj landoj, kiel Aŭstralio, Brazilo, Usono, Venezuelo, Polujo. Ankaŭ de aliaj kiel Italio, Aŭstrujo, Nederlando, Saarlando, Germanio, ktp. Diversaj Esperanto-Societoj gratulas kaj bondeziras. Tiel, Universala Esperanto Asocio, Skolta Esperantista Ligo, Aŭstria Katolikaj Esperantistoj, Heroldo de Esperanto, kaj granda nombro de unuopaj personoj.

Nun, la delegitoj de la diversaj landoj salutas la Kongreson kaj unuanime dankas pro la belaj aranĝoj kaj ĝenerala entuziasmo. Fermas la vicon de la salutoj Dro. Rafael Herrero, Prezidanto de la Hispana Esperantista Federacio per trafaj vortoj, montrante la ĝojon de la hispana esperantistaro antaŭ la bela realaĵo de tiu-ĉi Kongreso. Tre speciale dankas al la ĉefepiskopo, Monsinjoro Casimiro Morcillo, pro lia konstanta apogo al nia afero.

Kiel lasta punkto, Monsinjoro C. Morcillo parolis salutante al la kongresanoj, en bela Esperanto, per la jenaj vortoj:

La paco estu kun vi. La paco estas Dia donaco kaj vi dissemas ĝin ĉie, kaj vi konstruas ĝin per via universala lingvo. La paco estu kun vi en ĉi-tiu urbo kie la Sankta Virgulino venis por alporti la pacon de Kristo al la bonvoluloj.

En la epistolo de Sankta Paulo al la filipanoj oni legas tiujn vortojn: „Tiom da fideindaj aferoj, tiom da justaj, tiom da puraj, tiom da amindaj, tiom da bonfamaj, se estas ia virto, se estas ia laŭdindaĵo, tiajn aferojn, alprenu”.

Kaj vi estas alprenintaj tian amindan kaj laŭdindan aferon kia estas Esperanto por utiligi ĝin je la servo de la Eklezio kaj de la kristana frateco inter homoj.

Iam, kaj dum multaj jarcentoj, la Eklezio unuigis la homaron per universala lingvo. Vi, esperantistoj, deziras

ankaŭ unuigi, spirite, la homojn, per tiu ĝajna ilo kia estas via internacia lingvo.

Faru el ĝi pacarmilon kaj petu de Dio, per ĝi, pacon por la armiloj kaj pacon por la animoj.

Estu ankaŭ ĝi, en viaj manoj, justigilon, ĉar rifuzi al la popoloj kaj al la homaro iliajn rajtojn, estas okazigo kaj

kaŭzo de militoj.

Diskonigu, pere de Esperanto, la ordonon pri kristana karitato. Se Dio estas amo, la amo devas inspiri la homajn rilatojn; ĉar, sen amo ne eblas vera kristana societo.

Kaj portu, per viaj vortoj kaj per viaj gazetoj, la efektivigon de la kristana doktrino al la homoj kaj al la popoloj por kiuj la Evangelio estas ankoraŭ ne-



La prezida tablo. Meze staras Monsinjoro Casimiro Morcillo, ĉefepiskopo de Zaragoza.

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Dimanĉo	14.00-14.15	Piraĉununga, 198m. K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraĉununga (Sao Paulo), Brazilo.
	23.20-23.35	Bilbao. 265m. P. Radio Bilbao, Hispanujo.
	12.30-13.00	La Coruña. 250 m. P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
Lundo	22.40-22.57	Hilversum, 402 m. P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
	00.45-01.00	San José. 192m. P. Radio Welcome CW47A, San José, Urugvajo.
	11.55-12.00	Bern. 48.66m, 31.46m, 13.94 m. P. D-ro Baur. SRG. Kurzwellendienst, Neuengasse, 23, Bern, Svislando.
Mardo	15.00-15.10	Ljubljana. 327m, 221m. K. Radio Ljubljana, Jugoslavujo.
	17.35-17.40	Bern. 48.66m, 31.46m, 13.94m. P. D-ro Baur.
	17.55-18.10	Roma. 50.34 m., 41.24 m., 30.90 m. P. Radio Roma, Cassella Postale 320, Roma, Italujo.
Merkredo	19.00-19.15	Stockholm, 26.10m, 19.90m. P. Radio I.B.R.A., Esperanto programo. Poŝtfako 822, Stockholm 1, Svedujo (nur la lastan mardon de ĉiu monato).
	19.15-19.30	Carlet. 288m. I. Radio Carlet (Valencia), Hispanujo.
	16.00-16.10	Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.
Jaŭdo	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	21.55-22.05	Wien. 208m, 48.74m, 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.15-22.20	Hilversum, 298m, 188m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Jaŭdo	06.45-06.50	Perpignan. 202m. K. Radio Perpignan-Roussillon, Perpignan (Pyr. Or), Francujo.
	08.30-08.45	Paris. 348m, 249m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55-12.00	Bern. Kiel marde P. D-ro Privat.
Jaŭdo	17.35-17.40	Bern. Kiel marde P. D-ro Privat.
	22.30-23.00	Valencia. 200m. I.K. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
	22.45-23.00	Zagreb. 264m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Jaŭdo	23.30-24.00	Sao Paulo, 62.83m. I.K. Rádio Progresso. Sao Paulo, Brazilo.

konata.
Zaragoza kaj ĝia eparkia Eklezio, kun sia dudekjarcenta kristana spertado, ĝojas pro via aktiva ĉeesto, komprenas kaj kuraĝigas viajn penojn, kaj deziras al vi tre abundajn rezultojn, kaj tre feliĉajn tagojn inter ni.

En plena entuziasmo finiĝis la festo per la preĝo „Saluton Maria”.

Post laborplenaj kaj ĝuoplenaj tagoj, ĉe la ferma kunsido, oni legis la decidojn de la ĝenerala kunveno, inter kiuj la plej gravaj estas: Altigo de la kotizoj por ebligi pli ampleksan laboron je „Espero Katolika” kaj eldono de katolika esperantista adresaro. Akcepti en la estraro de IKUE la Sropin. F. de la Puente kaj A. Pedro Marqueta Roy, kiel reprezentantojn de Hispanio. Ili estis la motoroj de la nuna Kongreso.

Oni aranĝos la proksiman IKUE-Kongreson en Lourdes, (Francujo) en 1958, okaze de la centjara jubileo. Oni agnoskas Munkenon kiel urbon de la sekvonta Kongreso, koincidanta kun la Eŭkaristia Kongreso, dum 1960.

Oni varme rekomendas labori entuziasme kun la organizo Pax Christi kiu oficiale rekonis la valoron de Esperanto

kaj praktike uzas ĝin.

Oni dankas tre speciale al Sroj. L. G. C. de Jong, Arni Decorte kaj f-ino. Truus Durenkamp pro la senlaca laborado, sukcesplena.

Fine, Dro. de la Puente, prezidanto de la Org. Komitato, dankis al ĉiuj partoprenantoj la ĝentilan kunlaboron kaj al ĉiuj deziris feliĉan reveturon.

Per la himno „La Espero” la kongreso finiĝis.

Universitata Biblioteko kaj Esperanto

Antaŭ kelkaj monatoj la Poezia Kolekto de la Lockwood Memorial Library, Universitato de Buffalo, U.S.A., skribis al poetino Marjorie Boulton, petante malnetojn de ŝiaj anglaj poemoj, se eble. Tiu biblioteko kreis kaj ankoraŭ kreas grandiozan kolekton da poeziaj malnetoj kaj faras valorajn esplorojn pri la artaj procedoj kaj kreaĵ fenomenoj. Marjorie Boulton, iam ja angla poetino, kvankam neniam grava, pro personaj kaŭzoj, ne verkis anglan poemon post decembro 1952 kaj tial skribis al la Biblioteko, klarigante la aferon kaj proponante, ke

ŝi sendu kelkajn Esperantajn malnetojn.

La Biblioteko tuj akceptis, kaj estos preta ricevi de ŝi aliajn tiajn malnetojn aŭ, laŭ la usona esprimo, „laborfoliojn”. Ŝi poste sendis al ili malnet-kajeron de William Auld, kaj ili denove tre dankis ŝin. Videble ili tute dece kaj serioze taksis Esperantan literaturon.

Ili tamen diris, ke ili ne povas, pro manko da rimedoj, starigi seriozan kolekton da Esperantaj malnetoj, kvankam ili ŝajne ŝatus fari tion. Sed tradukoj el aliaj lingvoj en la anglan tre plaĉas al ili, kaj tial Marjorie Boulton sugestas, ke Esperantistoj kiuj faris seriozajn kaj bonkvalitajn tradukojn el Esperanto anglan sendu al la Biblioteko kelkajn malnetojn, por daŭrigi la ŝajne sinceran intereson pri nia lingvo. Adreso: Poetry Collection, Lockwood Memorial Library, University of Buffalo, Buffalo 14, New York. Oni kompreneble ne sendu bagatelojn, sed imponu per pruvoj de serioza erudicio.

★ ★ ★ ★

Esperanto-Miliongazeto ?

Ĉu revo? Tute ne! Ni havos baldaŭ milionope eldonatan gazeton en Esperanto, se ĉiuj samideanoj volas.

Ek de oktobro la eldonejo MONDO, en Brasschaat, Belgujo, eldonis, sub la aŭspicio de Reĝa Belga Ligo Esperantista, monatan gazeton grandformatan kaj aspektantan kiel ĉiutaga ĵurnalo.

MONDO estas eldonata franc- kaj flandralingve kaj ĝia enhavo konsistas el informoj pri atingajoj de la Esperantomovado kaj kurso de Esperanto.

Supozu ke sufiĉa reklam-apogo ebligu al ni senpage distribui nian gazeton milionope kaj varbi por ĝi abonantojn pere de 2 grandegaj konkursoj, unu ĉiumonata (!) kun monpremioj de 1.000 ĝi 50.000 belgaj frankoj, kaj unu kursfina kun monpremioj de 500 ĝis 100.000 belgaj frankoj. Estas memkompreneble ke, tiamaniere vekante grandegan intereson por nia kurso kaj tiel formante multnombrian Esperanto-legantaron, ni povus iom post iom esperantigi la gazeton.

Nu, la reklam-apogon necesan por realigi tion kelkaj plej gravaj komercaj, industriaj kaj reklamfakaj entreprenoj promesis al ni, KONDIĈE KE LA ESPERANTISTOJ ANKAŬ HELPU, PRUVANTE LA VIVPOVON DE LA GAZETO!

Jen unika ŝanco, kiun la esperantistaro neniel rajtas maltrafi! Ĉiu vera samideano, eĉ se li ne komprenas la francan aŭ flandran lingvojn, havas la nepran, neeviteblan devon pruvi nun ke li serioze volas la realigon de nia idealo.

Ĉiu samideano senescepte tuj varbu abonantojn kaj mem abonu la gazeton MONDO, pagante la EGE MALALTAN abonprezon de nur 35,— belgaj frankoj por tuta jaro al la poŝtĉekkonto Bruselo No. 890.81 de Eldonejo MONDO sprl, Bredabaan, 280, Brasschaat, Belgujo.

La parolvico estas al la esperantistaro! MONDO

Vendredo	00.45-01.00	San José. Kiel marde.
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	19.15-19.30	Carlet. Kiel marde.
	21.30-21.45	Guatemala Cd. 470m, 197m, 47m, 30.50m. I. Radio-Esperanto, La Voz de Guatemala. Mez-Ameriko.
Sabato	11.05-11.30	Rio de Janeiro. 214m. K. Rádio Roquete Pinto PRD5, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
	17.30-18.00	Rio de Janeiro. 375m, 30.70m, 25.10m, 16.80m. K.I. Rádio Ministério da Educação, Praça da República 141A, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
	18.45-19.00	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.15-22.22	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

HORSISTEMOJ. La ĉi-supre indikitaj horoj estas laŭ horsistemo de Greenwich. Jen la korektoj farotaj por transskribi ilin en lokajn horojn:

Aldonu	1 horon :	Franca Ekvatora Afriko, Nigerio, Tunizio, ĉiuj eŭropaj landoj ne menciitaj sube.
„	2 horojn:	Bulgarujo, Egiptujo, Finnlando, Grekujo, Libano, Rodezio, Rumanujo, Sirio, Sud-Afriko, Turkujo.
„	3 „ :	Irako, Izraelo, Kenjo, Madagaskaro, Eŭropa Rusujo.
„	3½ „ :	Irano.
„	5 „ :	Pakistano.
„	5½ „ :	Hindujo.
„	7 „ :	Vjet-Namo, Tajlando.
„	8 „ :	Orienta Ĉinujo.
„	9 „ :	Japanujo.
„	10 „ :	Orienta Aŭstralio.
„	11½ „ :	Nov-Zelando.
Forprenu	1 horon :	Islando.
„	3 horojn:	Argentino, Brazilo, Urugvajo.
„	5 „ :	Orientaj Kanado kaj Usono.
„	6 „ :	Guatemalo, Meksikio.
Neniu korekto por :		Alĝerio, Britujo, Irlando, Maroko, Portugalujo, Franca Okcidenta Afriko.

Radio Roma. 2.XI, La dua de Novembro; 6.XI, Antikvaj monumentoj de Ravenna; 7.XI, Mondo Esperantista; 9.XI, Itala komponisto Bellini; 13.XI, „Thermae de Caracalla” en Romo; 14.XI, Novaĵoj el Italujo; 16.XI, „Sinjoro Tadeo” de Adam Mickiewicz; 20.XI, Pierluigi de Paletrina, la kantisto de Dio; 21.XI, Nia gazeto; 23.XI, Leterkesto kaj bibliografio; 27.XI, Itala belarta urbo Venecio; 28.XI, Tri gemoj de la Tireno: Vietri sul Mare, Amalfi, Ravello; 30.XI, Itala abatejo Montecassino.

REPREZENTIGO DE UEA ĈE LA UNESKO-KONFERENCO EN NEW DELHI

La sekvanta Sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO komenĉiĝos en New Delhi lundon la 5-an de novembro 1956. Verŝajne ĝi daŭros ĝis la 5-a de decembro. UEA, kiu havas konsultajn aranĝojn kun UNESKO, rajtas reprezentiĝi per unu observanto. Dum siaj kunsidoj en Kopenhago la Estraro nomis kiel observanton s-ron Lic. Tibor Sekelj, komitatanon, kaj kiel anstataŭanton s-ron L. Sinha.

S-ro Sekelj ricevis ĉiujn necesajn dokumentojn kaj informos pri sia agado dum la Konferenco tuj post ĝia finiĝo. Aliflanke la Ĝenerala Sekretario de UEA, kiu estas ŝargita ankaŭ pri la eksteraj rilatoj de la Asocio, sendis al la Ĝenerala Direktoro ampleksan raporton pri la agado de la Asocio en la lastaj du jaroj kaj tute speciale pri la helpo de UEA al laboroj de UNESKO. Laŭ la ĵus ricevita telefona informo la Ĝenerala Direktoro de UNESKO decidis cirkuligi al ĉiuj ŝtatoj-membroj kaj al la delegitoj ĉe la UNESKO-Konferenco la ĉefan parton de tiu raporto.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1956

Stato je la 30-a de septembro

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Jugoslavio	2629	3553	135,15
2.	Italujo	3025	3595	118,91
3.	Svislando	1740	1890	108,62
4.	Hispanujo	1825	1895	103,84
5.	Svedujo	6893	6805	98,72
6.	Francujo	5869	6383	96,78
7.	Nederlando	5074	4894	96,45
8.	Britujo	7608	7317	96,18
9.	Finnlando	2872	2685	93,49
10.	Germanujo	6986	6440	92,47
11.	Belgujo	2135	1895	88,76
12.	Brazilo	6820	5370	78,74
13.	Usono	3352	2393	71,39
14.	Danlando	2765	1865	67,45
15.	Norvegujo	2318	1440	62,12

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Kanado	345	500	144,93
2.	Islando	330	395	119,69
3.	Portugalujo	495	570	115,15
4.	Maroko	937	1061	113,23
5.	Japanujo	1182	1210	102,37
6.	Urugvajo	330	325	98,48
7.	Aŭstralio	1145	1025	89,52
8.	Izraelo	330	290	87,88
9.	Nov-Zelando	854	745	87,24
10.	Sudaŝtato	305	230	75,41
11.	Aŭstrujo	1485	995	67,—
12.	Meksiko	250	120	48,—
13.	Irlando	250	55	22,—

Radio - Babiloj

(9)

La Esperantistoj havas la
dissendojn, kiujn ili meritas

Specialaj paperaj aplaŭdiloj

Multaj artistoj sur la koncerta aŭ teatra podio bezonas la aplaŭdon de la publiko kiel necesan stimulilon. Se tiaj artistoj prezentas ion antaŭ la mikrofono de radiostacio, ili malagrable sentas la mankon de aplaŭdo. Dankesprimoj per karto aŭ letero estas por ili skriba aplaŭdo, kiu same instige al ili efikas kiel la brua manfrapado en salono kun publiko.

Ne nur la artistoj, prelegintoj, deklamintoj, muzikintoj k.t.p. antaŭ radio-mikrofono ŝatas ricevi pruvojn, ke oni aŭskultis ilin, sed ankaŭ la direktoj kaj teknikaj staboj de radiostacioj ne nur ŝatas, sed eĉ bezonas raportojn de geaŭskultantoj pri pli-malpli bona ricevo de la radioprogramoj.

La Svisa Mallongonda Stacio (Neuengasse 23, Berno, Svislando) tiucele disponigas al siaj geaŭskultantoj specialajn formularkartojn, kies (germanlingvan) tekston mi tradukas en Esperanton jene:

RAPORTO PRI RICEVO

Mi aŭdis vian mallongondan sendilon (voksigno)

..... frekvenco kc/s, ond-

longo m, tago: 195 ,

horo: je la loka tempo aŭ

G.M.T. La laŭteco de la ricevo estis O malforta

O sufiĉa O bona O bonega. Komprenebleco

..... Sonsvenoj (fading)

Ĝenoj (interferencoj) O neniu. Interferencoj ĉe la supra frekvencflanko O ĉe la malsupra frekvencflanko O.

Ricevilo: Anteno:

Kiel vi ricevas aliajn sendilojn en ĉi tiu frekvencrubando?

Ni konfirmas
la ricevon de Nomo:
ĉiuj raportoj Adreso:
pri ricevo.

Adresflanke estas ankoraŭ loko por:

Rimarkigoj pri la programo.

Tiel la geaŭskultantoj povas per malmultaj vortoj, ofte eĉ nur nigrigante rondeton kiel sur voĉdonilo, sciigi siajn opinion kaj valorajn informojn kaj tiel instigi kaj stimuli direktojn, teknikajn stabojn kaj geprezentintojn de radiostacioj kaj do influi la enhavon de la programoj kaj la kvaliton de la ricevo. Ofta raportado postulas multe da tempo, peno kaj afrankelspezoj; tial mi sugestas, ke la Esperanto-unuiĝoj (U.E.A. aŭ la landaj asocioj) presigu aŭ stenciligu specialajn „aplaŭdilojn” laŭ la ekzemplo de la svisa radio, kiujn gesamideanoj povus sendi al la radiostacioj laŭ presaja aŭ poŝtkarta tarifo. En la sekvonta n-ro donos projekton.

Hilversumo-VARA nun dissendas DEK minutojn!

Ĉiumerkrede Hilversumo-VARA dissendas socialismajn informojn, ĝis antaŭ nelonge „nur kvin minutojn” de 23.15—23.20, sed nun de 23.50—24.00. Do la daŭro duobliĝis. Konkludeble multaj eksterlandaj geaŭskultantoj montris sian intereson, sendante karton aŭ leteron kun dankesprimoj al la

disaŭdiga instanco (VARA, postbus 175, Hilversum, Nederlando), kiu pro tio duobligis la daŭron. Bedaŭrinde oni pli-malfruigis tiun Esperanto-programeron ĝis noktmezo. Tio estas maloportuna por multaj gesamideanoj (legu mian rimarkigon pri tre malfruaj dissendoj en mia 7-a „Radio-Babilo” sur p. 93), sed praktika por ne-esperantistoj, kiuj povas „fermi la radio-butikon”, kiam komenciĝas la informoj en Esperanto, ĉar post ili estas la fino de la programo. Sendube pro tio la programestraro elektis tiun malfruan horon. El esperantista vidpunkto la duobligo estas pli grava ol la malfrugo. Ĝi krome pruvas la grandan valoron de skribaj dankesprimoj. Aŭskultinte interesan radioprogrameron en Esperanto, ni memoru tion kaj agu laŭe.

S. S. de Jong

Internacie plej oftaj vortoj

En ESPERANTO, 1955, p. 166, s-ano R.R. atentigis pri la dezirindeco de tio, ke niaj verkantoj de lernolibroj kaj aliaj utiligu tabelojn de vortof-teco por prezenti unuavice al la lernantoj vortojn kun plej granda ofteco. Pro tio, kaj pro la sugesto de norvega samideano, ni presigas sube liston de 577 internacie plej oftaj vortoj. Tiu listo estis menciita, sed ne presita, en la libro *Enketo pri internacia helplingvo* de P. Bovet. Al tiuj, kiuj deziras scii la manieron de kompilado de tiu listo, ni rekomendas tralegon de la libro (havebla de UEA kontraŭ 5 steloj plus afranko), kaj tial ni ne represas la tekston ĉi tie. Necesas menci nur, ke ĝi estas bazita sur komparado de diversaj nacilingvaj vortlistoj kaj de esperantaj vortlistoj.

Al s-ro Bovet kaj al Henriette Ith ni esprimas dankon pro la afabla sendo de la listo.

La vortoj estas grupigitaj laŭ pleja ĝis malplia ofteco.

Al antaŭ bel bon ĉambr de du est far grand hom jar leg long mi nom parol part skrib tag ter unu urb vir voj vort;

afer alt am amik ankaŭ ankoraŭ aŭ cent ĉar ĉi ĉiam ĉio ĉiu ĉu demand dev dir do dom don dum en fil fin foj fort ĝi ĝis hav hor infan inter ir jam je jen jun kaj kap ke kiam kie kiel kio kiu kon kontraŭ kor kred kun kvar la labor land last lev li lok man manĝ met montr mort mult nov nun nur

Notlibro

En 1925, Sovetunio eldonis du poŝtmarkojn honore al la Unua Internacia Kongreso de S.A.T. Poste, aliaj poŝtmarkoj honore al Esperanto aŭ kun dulingvaj surskriboj aperis en tiu lando, kaj en Bulgarujo, Aŭstrujo, Jugoslavujo kaj Brazilo.

Nuntempe, la tuta serio konsistas el 26 P.M. des pli interesaj por kolekti, ke iliaj prezoj estas sufiĉe malaltaj; krome, tiu malgrava kolekto enhavas variaĵojn allogajn pri la dentoj, la paperspecoj kaj eĉ pri la surstampoj.

Kelkajn jarojn antaŭ la centa memorigo de la naskiĝo de D-ro ZAMENHOF, evento priŝtota de pluraj landoj per la eldono de speciala P.M., tiu nova kolekto laŭŝajne devus ricevi ŝatindan sukceson.

Sekve, ĵus aperis speciala albumo por la kolekto de tiuj P.M.; konsistanta el solida verda bindaĵo, formato 17 x 22, kun folioj ŝanĝeblaj kaj portantaj la bildon de la P.M. kaj la dulingvajn klarigojn por rapida kaj facila ordigo; tiu albumo estas havebla ĉe S-ro A. RIBOT, 11 rue Vergnes - MARMANDE Francujo, poŝtĉekkonto 30-900 Bordeaux, je la prezo afrankita: 32 steloj (registrita sendaĵo)

* * *

En recenzo pri lernolibro de s-ro Cou-teaux (n-ro 610, p. 138), s-ro Bernard skribis: „Ĉu iam en franca gramatiko pri Esperanto oni fine trovos tiun, nuran ĝustan, terminon (Volitivo)?”. Ni sciiĝis, ke s-ro Pierre Delaire en sia „L’Esperanto en 12 leçons” almenaŭ mencias tiun terminon: „L’imperatif-subjonctif (appelé aussi volitif) est la mode de la volonté...”

okul ol per person pied pli plu por port post pov pren pri pro proksim rapid rest ricev riĉ sci se sed sen sinjor strat sub sufiĉ sur temp ten tia tiel tio tiu trov tut ven vid viv vol;

akv ali aper apud baldaŭ blank cert ĉe da dek eĉ el fajr fal feliĉ ferm flank for form fru help ili iom iu kamp kelk kia kial klar komenc korp kur las lern lud mem mil mon ne neniam nenio ni nokt oft oni part pens plej plen pord respond rid rigard sam sekv send sent serv si sid supr tabl tie tre tri ver vi;

aer atend aŭd bezon ĉirkaŭ dezir di dorm ekster ĝoj halt hodiaŭ kant kiom kompren kvin leter liber lum memor mond mov neni nigr paper pas perd permes pet preskaŭ pur rakont renkont ruĝ ses sol spirit star sun ŝajn tamen tial tiam tir tra trink tro turn;

ag akcept anim art atent ating aŭskult bat best brak ĉia esper facil famili forges frat hejm iam io jes ĵet kapt kar kaŭz knab konduk kuŝ libr lign lingv maten mez milit monat nask neces okaz or pag paŝ prezent propr punkt rajt reĝ serĉ spec stat super ŝi ŝton tim vesper vilaĝ vizaĝ voĉ vok zorg;

ajn ambaŭ arb benk buŝ ĉef ĉeval ĉiel(o) dank daŭr dekstr dik direkt edz ekzempl gajn honor ide instru kalkul kolor kovr kri kvankam laŭ leĝ lit loĝ malgraŭ marŝ moment mont mur natur naŭ nek nenia nenies neniom ok okup onkl ordon pan pec pen plank plezur plor preĝ prov raci rekt ripet river salt sep ŝanĝ ŝip ŝtat tiom trankvil trans tuj tuŝ uz vent vest veter;

aĉet arĝent arme batal bild bird bril bru brul cel ci divers dolĉ egal fenestr fer fingr florflug fund gaj ĝarden har hieraŭ histori ia ial ie iel imperi interes intern ĵus kapabl kies konserv kort kost kresk krom krur lakt manier mar mastr metr mezur mir morgaŭ nombr opini ord orel ov paf pluv popol produkt reg rilat rimark rimed romp rond san semajn senc silent simpl son sufer tranĉ vagon valor varm verk vetur vojaĝ;

afabl aĝ akompan amas anstataŭ apart av babil bank bar blu blov ĉapel ĉes ĉie ĉiel (adv) dent dimanĉ doktor dolor donac dub efektiv efik ekzist estim fakt firm(a) frap fraŭl frukt genu glas graci grav gren ĝeneral ĝust herb horloĝ hund ies intenc januar juĝ just kaf kajer kat kaz klas kok kol koler komerc komun konsil konsist konstru korb kre kuir kuraĝo kuz lang lav leon lini lund maj mank mark mart mol naci naz neĝ objekt pac pal pastr pez plaĉ plum pom postul prav precip prem printemp promen propon puŝ raid respekt ripoz roz rul sabat sak sang sankt sat scen seĝ soldat somer sort streĉ substanc suker ŝaf ŝat ŝlos ŝtof ŝtup tem util vek vend viand vin vintr vizit.

Italujo. Okaze de la deka datreveno de la fondo de la *Sicilia Delegacio* de Itala Esperanto-Federacio, la Sicilia esperantistaro eldonis serion da belaj poŝtkartoj kaj serion da glumarkoj (Adreso: Corso Vittorio Veneto 92, Ragusa, Sicilio). Aperis ankaŭ bela, grandformata turisma folio pri Ragusa kun landkarto de la provinco. Petu ĝin de Ente Provinciale del Turismo: Camera Commercio, Piazza Libertà, Ragusa, Sicilio.

* * *

Ne tute serioze...

Mi bone komprenas la gravecon de tia aranĝo, ĉar kiam en mia biblioteko mi bezonas trovi iun libron, plej ofte mi devas mendi ĝin denove el la eldonejo.

Brazila Esperantisto.

Novaj Libroj

Duope ricevatajn verkojn ni recenzas; unuope ricevatajn ni nur mencias.

*) ricevebla ĉe U.E.A.

LA SENPERA VERBIGO DE ADJEKTIVOJ* H. A. de Hoog, 32 paĝoj, eldonis Libro servo de K.U.N.E., Nederlando. Prezo f 0,60.

Eble la plej potenca vortfara rimedo de nia lingvo estas la ŝanĝeblaj finaĵoj -o, -a, -e, -i. Ili donas al Esperanto nekonkureblan elastecon, kaj en ĉiu tavolo de uzado — de konversacio ĝis kreado — oni ĝue ekspluatas tiun mirindan dinamikon. Aparte loga estas la verbigo de adjektivaj radikoj, kaj la energie kurtaj formoj *klaras, oftas, ruĝas, troveblas* ktp. aperas jen sporade jen pli obsede ĉe apartaj aŭtoroj. Oni jam pridubis la bonecon de tiaj formoj, kaj la Prezidanto de la Akademio dum la Harlema Kongreso ilin malaprobis, apogante sin je iu lingva respondo de Zamenhof.

Nun S-ro de Hoog ekzamenas la demandon. Li konstatas, ke la supra lingva respondo traktis speciale la formojn „amatas” por „estas amata” k.s., do ĝi estu komprenata en tiu aparteco; krome, ke la averto de Zamenhof estas tre milda, kaj antaŭvidas eventualan akcepteblon de tiaj formoj. La aŭtoro ankaŭ trovas ĉe Zamenhof mem ekzemplojn pri la verbigo de adjektivo (pravas, mizeras, pacienas, sufiĉas k.a.). Poste li konsideras la lingvan respondon en lumo de la historiaj cirkonstancoj en 1907, kiam Zamenhof ĝin verkis.

La traktato finiĝas per admirinde ekvilibra konkludo:

1. *La Esperantistaro gardu sin kontraŭ senkritika uzado de ĉiam pli multaj verbigitaj adjektivoj.*
2. *Ĉi tiu fenomeno, kvankam esenca en la Esperanta vortformado, kaj jam amplekse praktikita de Zamenhof mem, meritas kaj bezonas trankvilan evoluon.*
3. *Imitemo kaj ludemo povus kaŭzi misevoluon en tiu fenomeno, kiu estas pli komplika ol ĝi ŝajnas ĉe unua vido.*

Al tiu tripunkta juĝo mi plene konsentas. Por atingi ĝin S-ro de Hoog entreprenas detalan rezonadon en kiu lin gvidas tre bona sento por la spirito de la Esperanta lingvo-uzo. Mi trovas efektive lian trasenton multloke pli fidinda ol lia rezonado. Ofte li tro fidis la logikon, kiu estas — laŭ atesto de Zamenhof mem — nur unu el pluraj

principoj regantaj iun lingvon. Se *logiko* estas la mekanismo, *psikologio* estas la risorto, kiu la mekanismon movas. Ĝi impulsas nin formi *kontraŭ-as*, kaj detenas nin fari ekzemple *ol-as* aŭ *des-as*. Analizo devus do sekvi la procedon de vortkreado, ne preni postfare la rezulton kaj ĝin malvarme dissekci. Tio ĉi estas laboro inversa kaj senbezzone malfacila.

Tion S-ro de Hoog ŝajne ekperceptas, kiam li diras „la radikvorto determinas la agon”. Tio devis konduki lin al la konstato, ke la verba potencialo, ekzemple de *kuraĝ* aŭ *martel*, kuŝas en la radikoj mem, kaj nur tial oni aplikas al ili la -i por aktivigi tiun verban latenton. Tia estas la tezo de J. A. Gill, kiun tezon De Hoog forregalas kiel kontraŭan al la analizo de Kalocsay, dum efektive ĝi estas forte kontribua, ĉar ĝi malkovras la animantan principon de la vortkunmeto. Ekzemple *hok*, *kron*, *tapiŝ* signas objektojn, sed ankaŭ implicas certan uzon, sekve ili portas en si *latentan verbecon*, kiun la finaĵo -i elvokas. *) Sed De Hoog trovas la verbecon *inter* la radikoj kaj la finaĵoj.

Li diras:

„En la vorto *kuraĝi* la nocio *est'* ne estas esprimita per -i, sed implicita de la rilato inter la du elementoj.

„Same en *marteli* la nocio *ag'* ne estas esprimita per -i, sed implicita de la rilato inter *martel* kaj -i.”

Tia interpreto de la vort-dinamismo ŝajnas al mi malpli trafa.

La aŭtoro sin bazas sur la vortfara teorio de Kalocsay, malakceptas tiun de Gill kaj ne mencias la trian tezon, de ekzemple Nylén, kiu tute neas gramatikan karakteron de la radikoj. Efektive la tri teorioj ŝajnas reciproke ekskludaj:

1. Kalocsay. Radiko havas unu gramatikan karakteron.
2. Nylén. Radiko ne havas gramatikan karakteron.
3. Gill. Radiko havas plurajn gramatikajn karakterojn.

Ŝajne neniun rimarkis, ke tiuj tri ŝajne kontraŭdiraj teorioj estas apartaj facetoj de la tuta vero. Kaj mi formulas tiun veron jene:

*) Gill diras prokimume: *Hok* signas (a) konkretajn kun (b) certa formo, faritan por (c) certa uzo. Hoko akcentas la konkretan esencon de la radikoj, hokA la formon (kvaliton) kaj hokI la uzon, funkcion.

- a. *La Esperantaj radikoj latente posedas plurajn gramatikajn karakterojn, laŭ la asocio de la radik-ideo.*
- b. *Ĉe la pliparto de la radikoj unu gramatika karaktero estas ĉefa kaj fariĝas elirpunkto por la ceteraj.*
- c. *Kelkaj radikoj estas pli-malpli neŭtralaj: neniun gramatika karaktero ĉefas. Ilin la vortaristoj arbitre asignas al unu aŭ alia kategorio.*

Ankoraŭ iom mi volas tuŝeti la asertojn de De Hoog. Sur p. 28 li vidas teorian malakordon (kiun la praktiko venkis) inter la hindeŭropaj radikoj de Esperanto kaj ĝia ne-hindeŭropa vortfarado. Nu Drezen jam antaŭ 25 jaroj konstatis, ke Esperanto triumfis tutmonde ĝuste tial, ĉar al sia vortmaterialo okcidenta ĝi aligas vortfaradon ne okcidentan (fleksian), sed aglutinan, do mezan inter okcidentaj kaj orientaj lingvoj.

Sur p. 26 De Hoog diras, ke almozi = peti almozon. Tio estas ebla, tamen la propra kaj en uzado ĉefa signifo estas almozi = doni almozon.

Plue la aŭtoro troigas la verbigadon de adjektivoj per unuflanka elektado el nia literaturo *traduka* (la Proverbaro, Infero, Eterna Bukedo, Cezaro). Tradukisto, serĉante solvon, emas pli uzi la konciz-rimedojn de la lingvo, ol originalisto.

Kaj kritikante la verbigojn de Degenkamp (en la originala verko *Esperanto 60-jara*): konstateblis..., malfacilas distingi..., kompreneblas, ke..., rimarkindas, ke..., li ne atentis, ke ĉiuj estas mallongigoj de *adverbo* plus *esti*, ne de *adjektivo*. Ial ni pli volonte diras („Necese fari tion”, „Necese, ke li iru”, „Fruas” (= estas necese, estas frue), ol „Mono necesas”, „Li fruas” (= estas necesa, estas frua). La kaŭzon de tiu prefero mi ne povas analizi, sed ĝi avertas, ke la adverbo ne estas tute „sen aparta signifo”, kiel la aŭtoro pretendas sur alia paĝo.

La traktato de S-ro de Hoog atingas, kiel mi diris supre, sane prudentan konkludon. Mi akcentas ankaŭ, ke li rezonas dense, bone organizas sian argumenton kaj tre taŭge dokumentas ĝin. Miaj ĉikanetoj tuŝas nur tre etan parton de tre valora enhavo, kiun mi legis kun profito, kaj kiun mi rekomendas.

R. Rossetti

ĈARPENTILOJ — Sugestata Esperanta Nomenklature de E. M. Rosher. 7 paĝa broŝuro kun 2 paĝoj da ilustraĵoj; havebla ĉe la aŭtoro. „Tamalpais”, Kingsley Green, Haslemere, Surrey, Anglujo.

Jen utila kolekto de la ĉefaj terminoj bezonaj por priskribi la konatajn ilojn kiujn uzadas ne nur la ĉarpentisto sed la amato hejme. Du proponoj estas diskutindaj: —

„Renĉilo (angle, wrench) ne aperas en P V kvankam en F k L sed ĉu „bolt-(in)turnilo” ne sufiĉas? (komparu „ŝraŭbturnilo”) „Gaĝo” (por mezurilo anstataŭ „gaŭĝo” de la Suplemento) La fakto, ke „gaŭĝo” jam staras en la Suplemento difinante mezurilon, estas

kaŭzo lasi ĝin ĉe tiu difino; sed krome, ĉu estus bone nomi unu specon de ĉizilo per memstara radiko? (La kompilinto plue volas uzi la de li delokigitan formon „ĝaŭgo” por difini kurbĉizilon.)

„Labor-Benko” (paĝo 3) estas erara priskribo de ĉef-stablo.

La sekcio „Boriloj” estas nefinita.

„Drilo” (paĝo 7) ampleksas la tutan ilon, ne nur la borilon.

La klariga teksto ne estas libera je malglataĵoj aŭ eĉ eraroj ekzemple (paĝo 3) „Tir-Tranĉilo estas... uzata... per tirado de la klingo *al si mem*. (*al la uzanto*).

La ekvivalentaj vortoj en la angla lingvo estas utilaj nur al anglalingvuloj; aldonindaj estus la formoj en aliaj lingvoj.

La konvencia formo & aspektas fremda en esperanta teksto. Se oni nepre deziras mallongigon ĉu *k*, ne sufiĉus?

Ie-tie ĝenas per malklareco la neperfekta reprodukto de la ŝablonoj, sed entute la broŝuro estas havindaĵo por la esperantisto-ĉarpentanto.

T. Fraser

VIVU LA STEL'! (*Kantokolekto por esperantistaj kunvenoj). Eld. Förlagsföreningen Esperanto, Stockholm, 1956. 64 p. F = 10,5 x 14,5. Prezo: 2 sv kronoj.

Tiu ĉi kantokolekto volas, laŭ la antaŭparolo de la libreto, „gajigi kaj agrabligi la kunvenojn kaj ekskursojn de la svedaj esperantistoj”. La originan kompilon por tiu ĉi eldono, la kvina, faris E. Malmgren kaj S. Alexandersson, kaj la finan aranĝon la estraro de Eldona Societo Esperanto. La kolekto ampleksas kelkajn komunesperantajn kantojn, ŝatatajn svedajn kantojn de diversaj specoj, malnovajn kaj novajn, kelkajn religiajn himnojn, la popolajn himnojn de la kvin Nordlandaj popoloj.

La elekto estas bona (mi konsideras la supre nomitan celon de la kantaro kaj la limigitan spacon). La tradukoj estas bonaj kaj muzike kaj poezie, kelkaj estas majstraj kiel poezia tradukarto. Papero kaj tipografio estas bonegaj. La libro estas memkomprenebla posedaĵo de ĉiu sveda esperantisto.

Vidante fremdan, interesan kantotekston mi pensas: Se mi havus ankaŭ la melodion! Certe multe pli multaj alilandanoj aĉetus tiun ĉi libron, se ĝi enhavus ankaŭ la melodiojn, kaj certe ili havus grandan ĝojon de multaj el la kantoj. Pli kosta pretigo, jes. KELI eldonis himnaron kun notoj. Ĝi estas internacia, sed la eldonkvanto kredeble ne estas pli granda ol tiu de tiu ĉi kantaro. Verŝajne oni iel ebligis muziknotojn en la kantaro de KELI. Eble oni povus iel ebligi ankaŭ por aliaj kantaroj. — Tio neniel estas kritiko, nur penso, sugesto.

Kaj alia penso: ĉu niaj poetoj kaj muzikfarantoj ne povus iom pliriĉigi nian provizon de originaj esperantaj kantoj?

Stellan Engholm

NI EN SKANDINAVIO.* Willy Breinholst. Esperantigis F. Szilágyi kaj Regina Emson. Ilustris Léon van Roy. 20 paĝoj, 22 x 16 cm., broŝurita. Eldonis Norda Prismo, Stockholm. Prezo: sv.kr. 1:60.

Ĉi tiu libreto de dana humoristo aperas en esperanta vesto post furora sukceso en sia anglalingva originalo. Ĝia aŭtoro celas redoni kolekton

„de ne kontesteblaj faktoj pri la strangaj kreaĵoj, kiuj loĝas en la landoj de Hans Christian Andersen, de la Noktomeza Suno, respektive de la Buterpantablo.”

La maniero de etnografia klarigo uzata de s-ro Breinholst estas plej bone komprenebla per citado.

„Danlando estas agrikultura lando... La terkulturado estas forte mekanigita. Antaŭe oni melkis bovinon tiel, ke la kampulo tenis la mamojn, dum la bovino saltis tien-reen, sed nun oni preferas la maŝinmelkadon, kio ne faciligas la laboron, ĉar post tio la kampulo devas melki la bovinon laŭ la malnova maniero.”

„Norvegujo estas tre malebena. La norvegaj montoj estas tiel multnombraj, ke por havi lokon por ili ĉiuj, kelkajn oni devis meti unu sur la alian.”

„Entute la skandinavianoj estas tre puremaj kaj bone frizitaj. Svedoj estas eĉ tiel fervoraj, ke ili razas sin antaŭ ol iri al la barbiro.”

Kompreneble, en ĉi tia nepre konciza

monografo kelkaj detaloj bedaŭrinde mankas. Oni trovas:

„La plej populara maniero de la rondveturo en Danlando estas tiu per biciklo. Oni ricevas sian unuan biciklon kiel dujarulo kaj neniam plu en la vivo ĝin forlasas.”

Oni tamen ne mencias la fakton, konstateblan de ĉiu partopreninto en la ĵusa UK en Kopenhago, ke nur 2% el tiuj bicikloj posedas ian bremsan krom la piedoj de la veturanto aŭ ties kapablo rapide sin ĵeti surteren en okazo de bezono. Por la avine regata brito tiu specialaĵo estas aparte frapa.

Krome mankas mencio pri la stranga sono, kiun oni iufoje aŭdas sur la stratoj de Kopenhago. La vizitanto komence supozas, ke korpulenta muzikistino, misokaze glutinte buŝharmonikon, histerie kuras al la hospitalo, por ke oni tiru la instrumenton el ŝia trakeo. (Oni poste konstatas, ke tio estas sireno de estingista veturilo.) Tamen la verketo estas atentinda „multo en malmulto.”

La spritaj karikaturaj de la belgo van Roy plene konvenas al la teksto, kiu sidas sur bonega papero en gratulinda tipografia aranĝo.

Gerald C. Jervis.

PACO KAJ MILITO DUM LA FEREPKO DE BORNHOLM de Ole Klindt-Jensen. Trad. H. V. Rasmussen. Eld: Internacia Studenta Esperanto Unio, Boks 136, Kopenhago. 2a eld., 1956. 7 p. 14 x 20.

42-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

3—10 aŭgusto 1957 — Marseille
Francujo

Adreso: 32, Cours Estienne d'Orves, Marseille. Telefono: Pr. 55—46. Telegrafo: Esperanto.

Banko: James Rosa, Marseille.

Ĝirkonto: Groupe Esperantiste n-ro 156-15.

OFICIALA KOMUNIKO

n-ro 1 la 1-an de oktobro 1956

Kotizoj: Ĝis fino de decembro validas la jenaj kotizoj: kongresano 2.400 fr.fr., edz(in)o de kongresano 1.200 fr.fr. junul(in)o ne pli ol 20 jara kaj studentoj 800 fr.fr.

Rabatoj: Plenaĝaj aliĝintoj, kiuj estas Individuaj Membroj de UEA (t.e. ricevas minimume la Jarlibron) rajtas rabaton de 400 fr.fr. Edzino de Individua Membro rajtas rabaton de duono de tiu sumo, sed ne aliaj familianoj.

Unua bulteno: La okpaĝa Unua Oficiala Bulteno, kun listo de Perantoj, provizora programo kaj aliĝilo estas senpage ricevebla ĉe la Landaj Asocioj aŭ ĉe la adreso de la Universala Kongreso.

Artikolo: Lokaj esperantistaj societoj, aliĝintaj al la Landa Asocio, povas senpage mendi ĉe la Kongreso artikolon pri Marseille por klubaj kunvenoj.

Nova peranto: Bonvolu aldoni al la Oficiala Listo: S-ro R. Gonin, 7 Rue des Platanes, Lyon III, Francujo (nur por la blinduloj).

Poŝtkartoj: Mendu la kolorajn poŝtkartojn pri la Universala Kongreso: prezo 100 fr.fr. (aŭ kvar respondkuponoj) por 10 ekzempleroj. Haveblaj ĉe la Landaj Asocioj aŭ ĉe la Kongreso.

Glumarkoj: La plurkoloraj kongresaj glumarkoj estas mendeblaj je la prezo de 100 fr.fr. (aŭ 4 responkuponoj) por 2 folioj de po 25 markoj. Vin turnu al la Landaj Asocioj aŭ al la Kongreso.

Loterio: L.K.K. decidis disdoni lotumotajn premiojn inter la unuaj mil pagitaj kotizoj. La unuaj tri donacoj konsistas el subvencioj por pasigi la kongresan semajnon en Marseille: respektive 15.000, 7.000 kaj 3.000 fr.fr. Aliaj 28 premioj konsistas el verkoj de Auld, Kalocsay, Lapenna, Thorsen, Waringhien kaj el abonoj al „Esperanto”, „Heroldo de Esperanto”, „La Praktiko”, „La Nica Literatura Revuo”.

Statistiko: (ĝis fino de septembro) Aŭstrujo 2, Belgujo 4, Brazilo 3, Britujo 12, Bulgarujo 1, Danlando 7, Finnlando 5, Francujo 39, Germanujo 13, Hispanujo 3, Italujo 16, Jugoslavio 8, Maroko 1, Nederlando 7, Norvegujo 3, Novzelando 1, Pollando 2, Svedujo 13, Svisujo 5, Usono 1. Entute: 146 el 20 landoj.

Gian Carlo Fighiera

Naskiĝoj

Ahlren. Al Anna-Lisa kaj Åke Ahlren, Multrågatan 150, Vällingby, Svedujo, naskiĝis la 11an de aŭgusto 1956 tria infano, **Hans Bertil**, frato al Lennart kaj Brigitta.

Jaques. La 31.8.56 naskiĝis **Gerda**, unua filino de Hugo Jaques-Henny De Kete-laere, Lange Beeldekenstraat 29-31, Antwerpen, (membroj kaj profesorino de la „Verda Stelo”, filino de M. De Kete-laere).

Lindemann. Al Werner Lindemann kaj Hilde Lindemann, Trenkelbachstr. 24, Bildstock, Sarlando, naskiĝis la 26an de julio 1956 filino **Jutta**.

Zunko. Marija, edzino de nia fakdelegito inĝ. **Zunko Oto**, Pula, naskis filon, **Hrvoje**.

Geedziĝoj

Ivanovic-Pottier. La 16an de julio 1956, en Fécamp (Seine-Maritime), Francujo, geedziĝis Monique Pottier, kasistino de la loka Esperanto-grupo, kaj Zivko Ivanovic el Beograd (Jugoslavio). La geedzoj nun loĝas en Ivanjica (Jugoslavio), kie s-ro Ivanovic instruas la francan lingvon.

Marti-Vila. La delegitino en San José, Urugvajo, María Julia Vila edziniĝis la 24.8.56 al José Martí. Ili nun loĝas en la ĉefurbo Montevideo.

Seeman-Suchardova. La 14an de septembro 1956 geedziĝis membroj de la „Verda ĉaro de Julio Baghy” en Praha Tonda Seeman kaj Eva Suchardova.

Doktorigo

Nia samideano s-ro Guillermo H. Fos-sati finis siajn studojn kaj doktoriĝis pri medicino kaj ĥirurgio. Gratulon!

S-ro Josicugu Okamoto, direktoro de la fako de teknikaj vortaroj de la aka-demio, forpasis la 13an de marto pro rektuma kancero.

Li estis iam ĉefsekretario de Japana Esperanto-Instituto kaj konata kompilin-to de vortaroj.

S-ro Okamoto naskiĝis la 3an de marto 1905 en malgranda vilaĝo apud la urbo Ueno en Mie gubernio, situanta inter Nagoya kaj Osaka. Li lernis es-peranton en la jaro 1919, kiam li estis studento de la Tria Nacia Kolegio, Kioto.

S-ro Okamoto estis membro de Lingva Komitato de la jaro 1933 kaj estis elek-tita direktoro de la Fakoj de Teknikaj Vortaroj de la Akademio 1950.

Kamaryt. Ĉeĥoslovakano esperantist-aron kaj la tutmondan Esperanto-mova-don trafis granda perdo en forpaso de **Dro Stanislav Kamaryt**, unu el la elstaraj gvidantoj de la ĉeĥa movado. Li estis



emerita licea (gimnazia) direktoro, filo-zofo, ĥemiisto, pioniro de la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado, iama prezidanto de ĈSEA, redaktoro de la organo Esperan-tista, publicisto, aŭtoro de la filozofia vortaro, ĉefa redaktinto de Ĉeĥoslovaka Antologio, eminenta poezi-tradukanto, longjara membro de Esperanto-Akade-mio, kaj lingvofakulo. Li mortis en aĝo de 73 jaroj.

En Rio de Janeiro mortis en la 22a de marto lasta nia eminenta samideano D-ro Mário Augusto Teixeira de Freitas.

Granda idealisto, ŝtatulo kaj sociologo, D-ro Teixeira de Freitas, inter aliaj labo-roj, kreis kaj organizis la Brazilan Insti-tuton de Geografio kaj Statistiko kaj estis dum longa tempo ĝia unua Ĝenerala Sekretario. Li estis ankaŭ Prezidanto de la Interamerika Instituto de Statistiko, de la Brazila Asocio de Edukado kaj de la Brazila Societo de Statistiko, Vicprezi-danto de la Internacia Instituto de Sta-tistiko kaj membro de pluraj kulturaj kaj filantropiaj institucioj.

D-ro Teixeira de Freitas publikigis multajn grandvalorajn verkojn.

La 13an de junio ĉesis bati la koro kaj fermiĝis por ĉiam la okuloj de unu el la plej elstaraj pioniroj de la jugoslavia esperanto-movado: D-ro Dušan Maruzzi.

Li naskiĝis la 1-an de julio 1883 en Skradin. Li fariĝis esperantisto en 1919.

En 1927 li akiris ĉe la Ekonomia alt-lernejo en Zagreb docentecon pri Espe-ranto. La lernolibro de d-ro Maruzzi ĝisvivis kvin kroatajn, 2 slovenajn kaj 2 brajlajn eldonojn, kaj la lasta eldono havis eldonkvanton de 10,000 ekzemple-roj. Kunlabore kun Ivo Rotkvic li el-donis nacilingve esperantan vortaron.

Ĉiam simpla, modesta, pacienca, takto-plena, li sciis konkuri la homajn korojn kaj turni la respekton de neesperantista publiko al Esperanto en situacio mal-favora.

NEKROLOGO

Ingster. En Sosnowiec, Pollando, mortis la 13an de julio 1956 malnova pioniro D-ro A. Ingster.

Rusinov. Le 7an de aŭgusto 1956 mortis, en aĝo de 75 jaroj, s-ano Ivan Grozev Rusinov, membro de la Esperanto-Societo „Libero” en Ruse, Sovieto.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de oktobro 1956.

N-ro 287

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de septembro kaj ankaŭ por komparo, je la fino de septembro 1955:

	1955	1956
Asociaj membroj	7946	14691
Individuaj membroj		
MJ	924	919
MA	3936	4330
MS	820	730
Pat.	9	9
DM	291	292
HM	58	6334
	<u>13984</u>	<u>21025</u>

NOVA KOMITATANO:
Yagi, Prof. D-ro Hideo, 76 Kawarama-chi, Okayama, Japanujo.

DELEGITOJ

Britujo

Barry (Glam.) D.: Vakas.

Chalfont St. Giles (Buckinghamshire) D.: S-ro Johano Bereseforde, Studento, Newland Park College.

Kendal (Westmorland) D.: S-ro John E. Stuart, Ĉefteknikisto en hospitala labo-ratorio, 136 Highgate.

FD. (Turismo): La D.

South Shields (County Durham) D.: F-ino Ann Kinghorn, Ekspoŝtovicisto, 20 Salmon Street.

Todmorden (Yorkshire) D.: S-ro Alec. L. Finbow, Pastro (Unitariana), 20 Byrom Street.

Ĉeĥoslovakujo

Praha (Ĉeĥy) FD. (Katolikismo): S-ro František Buhr, Pensiulo, Praha-Brevnov 514, Belohorská 187.

Pribyslav (Jihlava) D.: S-ro Jaroslav Grodl, Instruisto, Pribyslav-škola (lernejo) aŭ Nizkov 105.

F.D. (Lingvoj): la D.

Svitavy (Morava) D.: S-ro Linhart Ryznar, Muelisto, Čtyřicet Lánů 460.

Danlando

Nysted (Lolland) D.: Vakas.

Francujo

Calais (Pas-de-Calais) FD. (Muziko): S-ro Robert Buerick, Muzik-instruisto, Cité Esplanade, A. 4.3.

Clermont-en-Argonne (Meuse) D.: Vakas.

Rombas (Moselle) D.: Vakas.

Hispanujo

Callosa de Segura (Alicante) D.: S-ro José M. Bernabéu Franco, Industriisto, Str. Trinquete 8.

Italujo

Varese (Lombardia) VD.: S-ro Gaetano Caraffa, Inĝeniero-instruisto, Viale Tamagno 19 (hejmo), Via Saccó 14 (Laborejo).

Nederlando

Eindhoven (N.B.) FD. (instruado): Vakas.

Lochem (G.) D.: Vakas.

Rotterdam FD. (Junularo): F-ino Helmi A. Veldhuyzen, Sekretariino, Eendrachtsweg 7.

Veendam (Gr.) FD. (Propagando): Vakas.

Vaals (L.) D.: S-ro Hubert Hermans, Komercisto, Pr. Bernhardstr. 4.

Sud-Afriko

Amersfoort (Transvaal) D.: Vakas.

Svislando

Chur (Graubünden) D.: Vakas.

Turkujo

Peranto: S-ro Hasan Kocaman, Statoficisto, Mühürdar Caddesi 81, Kadıköy-Istanbul.

Urugvajo

San José (San José) D.: Vakas

Usono

Baltimore (Maryland) FD. (Elektrotekniko): S-ro Paul E. Nace, Elektroinĝeniero, 15 Nan Ave., Baltimore 25.

Escondido (California) D.: S-ro John L. Spence, ekspostestro, Route 3, Box 327.

Fayetteville (Arkansas) D. D-ro Georg Iggers, Universitato-profesoro, 195 W. Lafayette St.

Houston (Texas) D. S-ro Edward F. Lacy III, Verkisto, P.O. Box 805, Houston 1.

FD. (Bahaismo): La D.

Pacific Palisades (California) D.: S-ro Thomas Goldman, ekonomiisto, 719 Chapala Drive.

Palo Alto (California) D.: S-ro John Clifford, Eksiĝinto, 311 Edith Avenue, Los Altos (California).

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1956

719. Real, S-ro Pedro, Paranaí, Brazilo.

720. Varanda, S-ro José, Petropolis, Brazilo.

721. Donovan, S-ro W. J., Wellington, Nov-Zelando.

722. England, S-ro G. Q., Fiji, Nov-Zelando.

723. Saltcastle, S-ro M. Tadley, Britujo.

724. Delaye, S-ro I., Petitville, Francujo.

725. Maurel, S-ro S., Barcelona, Hispanujo.

726. Balmas, D-ro Federico, Torino Italujo.

727. Bjerkaas, S-ro Erik, Harstad, Norvegujo.

DONACOJ AL LA ĜENERALA KASO

E. S. Hanks 10,65 gld.; S-ino Combebias 1,— gld.; E. Zumbo 1,22 gld.

DONACOJ AL FONDAJO-EKSPOZICIO

D-ro R. Zeballos Morales 5,— gld., G. C. Fighiera 2,30 gld.

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.
M. H. VERMAAS,
Administranto.

PRO VIA VARMA AMIKECO KAJ GASTAMO

NI KOREGE DANKAS!

La Familio Doneis el Texas, kiu faris 15.800 kilometran vojaĝon kvarmonatan tra 14 landoj volas anonci al ĉiuj siaj novaj kaj malnovaj geamikoj verdstelaj ke ni sane kaj feliĉe revenis hejmen Oktobro 10an, kun miloj da oraj memoroj. Ni petas paciencon se la korespondado iom lamas pro abundo de laboro kaj inundo de belaj leteroj kaj kartoĵoj. Denove ni volas danki al ĉiuj promultaj amikaĵoj, komplezoj, donacoj, helpoj kaj afableco!

LA DONEIS-FAMILIO

Mary	Peggy	kaj
Armin	Pancho	Petro

P.O. Box 105, Pharr, Texas, Usono

ANONCETOJ

Koresponda Servo Mondskala havigas korespondantojn el pli ol 30 landoj laŭdezire. Skribu, indikante vian aĝon kaj aldonante respondkuponon al: Daniel LUEZ, Boulevard Brossolette, LAON (Aisne), Francujo. Naciaj Esperantogazetoj bonvolu afable represi tiun ĉi anonceton.

Ne multaj libroj aperintaj dum la lastaj jaroj havis tian sanigan influon al nia lingvo kiel „**Du Malsanoj en Esperanto**” de H. A. de Hoog. Tial ĉiu esperantisto havanta lingvan ambicion kaj amon al Esperanto legu ĝin. Havebla rekte de la eldoninto aŭ de via nacia Esperanta eldonejo aŭ de la librosevo de U.E.A. Prezo sv. kronoj 4,40 inkl. sendkostojn. Erik Carlén, Hållabrottet, Svedujo, Poŝtĝiro 34 34 81.

Bahaa Kredo. Kiu deziras ricevi informojn pri tiu nova mondreligio, fondita de Baha'u'llah en 1844, kies ĉefprincipoj interalie estas unueco de la homaro, abolo de superstiĉoj, de rasaj, naciaj, politikaj, klasaj kaj religiaj antagonismoj, establo de Internacia Tribunalo de Justeco, adopto de Internaciaj skribo kaj lingvo, sin turnu kun int. poŝta respond-

kupono al la fakdelegito por Bahaismo: Manuel Freitas, Rua do Monte da Lapa, 49-1, PORTO, Portugalio.

Oficistino Despina Angelova Atanasova, bul. „Praga” 1, Sofia, Bulgario, deziras korespondi pri sociaj kaj kulturaj temoj kaj interŝanĝi ilustritajn poŝtkartoĵojn kaj diversajn librojn ankaŭ kaj ĵurnalojn. Respondo garantiita.

Matematiko senvorta internacie legebla: aŭtoro G. Peano (1927). Por revivigi la movadon necesas nur mono. Esploru grandajn bibliotekojn. C. Daglio, delegito.

Infandeseĝnaĵoj dezirataj por ekspozicio en ŝtata popol-lernejo. Krom kultura celo, tio estos efika Esperantopropagando. Oni reciprokos. S-ro Manuel Villalba, TALA, Canelones, Urugvajo.

Pola filatelisto deziras korespondi kaj interŝanĝi pm. Adreso: Jerzy Rasiak, Mikstat, woj. pozn., Pollando.

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14 s 6 p por ĉiu nokto. Prezoj malaltiĝas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. A. Bytheway, „Flat Four”, 1 Warrington, Crescent, LONDON, W. 9, Anglujo. Telefono CUNningham 4487.

Al la tutmonda Esperantistaro. Por nia

novembra ekspozicio ni urĝe petas ĉiun, helpu per la sendado de ĉiuspecaj Esperantaĵoj. „Esperanto Society of San Francisco”, 346 Staples ave., San Francisco 12, Calif. Usono.

Belaspekta, bonkvalita Globkraĵono (premsistemo — kongresa modelo) kun surstampo „ESPERANTO” en ĉarma ujo ĉiam estas celtrafa varbilo kaj valora donaco por geamikoj. Mendu vian specimenon kontraŭ 8 r.k. (aliaj 4—5 r.k., kartoĉoj 2 r.k.). Unuopa, rekomendita specimensendaĵo — nenia limdepago! Grupoj, importistoj rabatoj laŭ kvanto. Erich Stlozenhain, Uerdingen/Rhein (Germanujo).

Deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ĝeneralaj aferoj de la vivo, certe respondas. Skribu: Karlo Bongiovanni, Los Cisnes, Córdoba, Argentino.

Seniandajn kuirreceptojn se eble tipe naciajn, mi bezonas por vegetara kuirlibro. Mi pretas reciproki. Skribu: Clara Hess, Tupac Amaru 1132, Buenos Aires 7, Argentino.

Kateĥismo de la societa konduto en la mondo. Preparante libron je tiu ĉi temo mi estos dankema, se la leganto bonvolos respondi jenan demandilon: La nomo de



42-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO MARSEILLE - FRANCUJO.

3-10 AŬGUSTO 1957

Adreso: 32, Cours Estienne-d'Orves, Marseille-1.

Banko: Banque James Rosa - Marseille Bankkonto 4851.

Postgirkonto: Groupe Esperantiste - Marseille - no. 156.15.

Aliĝilojn kaj pagojn akceptas ankaŭ UEA, Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando!

ALIĜILO

BONVOLLU NEPRE SKRIBI PRESLITERE.

Mi aliĝas al la 42-a Universala Kongreso de Esperanto kaj samtempe mi sendas pagon kaj aliĝilon kune laŭ la informo sube.

Familia nomo (en nacia lingvo) S-ro, S-ino, F-ino (forstreku du)

Antaŭnomo/Voknomo (en nacia lingvo)

Strato kaj numero (en nacia lingvo)

Urbo (en nacia lingvo)

Provinco (kie necesas por la poŝto)

Lando (en Esperanto)

Profesio (en Esperanto - Nur por statistiko)

Antaŭnomo de edz(in)o/infano, kiu aliĝas samtempe (laŭ aldonita aparta aliĝilo)

Naskiĝjaro de persono ne pli ol 20-jara

Dato de tiu-ĉi aliĝilo

Subskribo

La Loka Kongresa Komitato rifuzos aliĝilojn kiuj venos post la fino de junio 1957.

RABATOJ: Plenaĝaj aliĝontoj, kiuj estas individuaj Membroj de U.E.A. (t.e. ricevas la Jarlibron) rajtas rabaton de F fr. 400. Edzino de Membro rajtas rabaton de duono de tiu sumo, sed ne aliaj familianoj.
La rabato ne validas por gejunuloj kaj studentoj.

MAKLERO: Aldonu makleron de 2 % por la Banko, pagante per ĉeko en eksterlando.

STUDENTOJ: La speciala tarifo por studentoj validas nur, se kun la aliĝilo troviĝas atesto de lia/sia fakultato.

lando kaj la plej signifaj produktoj de ĝia naturo. La pli vaste uzataj lingvoj. Manieroj de saluto kaj interkonatiĝo (alparolo, manpremo, kiso ktp.). Kio estas evitenda en la konversacio. Loĝej- (hotel-) -aranĝo. Horoj de la okupiĝo, manĝo, vizito. Invito kaj kutimoj dum altablado. Specoj de manĝaĵoj kaj trinkaĵoj/ankaŭ kafo, teo ktp/- kiam kaj kiel ili prezentiĝas. Ĉu oni pagas trinkmonon kaj kiamaniere. Kiel sin vesti ĉe diversaj okazoj. Moroj diferencaj de aliaj landoj. Bild-materialo kaj, se eble per aer-poŝto, la atentigo pri ĉi-rilataj libroj, estas bonvenaj. En amplekseco al vi konvena bonvolu respondi kontraŭ la farebla rekompenco laŭ via deziresprimmo. Larĝan eĥon ĝoj-atendas Marie Schäferová, U svobodárny 12, Praha 9, Ĉeĥoslovakujo.

Angla muzikisto (orgenisto, pianisto) kaj lia edzino (kantisto) ŝatus korespondi kun aliaj muzikistoj de ĉiuj landoj. S-ro David G. Hill, „Windy Top”, Barming Woods, MAIDSTONE, Kent, Britujo.

Aĉetas falditajn papiliojn, ovojn, krizalidojn, kokonojn, precipe malproksimlandajn. Eventuale interŝanĝo. Faru proponon. Same deziras revuojn pri brodaĵoj, trikaĵoj, kroĉtrikaĵoj kaj aliaj virinaj manlaboroj. Rekompenco laŭ deziro. Adreso: Hélène LERDUNG, 3 rue des Samaritains, Pfastatt, Haut-Rhin, Francujo.

Deziras korespondi kun gesamideanoj per Esperanto 30-jara instruisto de alta

lernejo. Kozi Sato, Nishikita-Machi 514-176, Nagasaki - S1, Japanujo.

Akademiano Ivan H. Krestanov, Ul. 6 Septemvri 2, Sofia, Bulgarujo, ripetas sian alvokon faritan en la maja numero. Urĝe petas alsendon de malnovaj jarlibroj, gazetoj, franclingvaj broŝuroj Boirac kaj Sébert, Internacia Mondliteraturo, Antologioj.

Matematiko pritraktata sole per simboloj (legebla por ĉiaj lingvanoj): aŭtoro G. Peano (1927). Lia verko: paĝoj 499, cm 18 x 11,5: reproduktebla nur per kliŝoj: kosto en mia lando 1.035.000 aŭ iom malpli: aldonu paperon kaj preson. Helpu iel! C. Daglio, Litta Parodi, Alessandria (Italujo).

30 hungaraj meti-lernejanoj komencis lerni Esperanton. Mi petas la samideanojn el ĉiu parto de la mondo, bonvolu sendi leterojn (Pl., presajon) al la suba adreso por ilia kuraĝigo kaj instigo. Ĉiun leteron ni respondas, ĉiun sendaĵon ni skribas dankos. Eventualan abonon je la „Esperanto” ni elkore akceptus. Kursgvidanto, Adreso: „Kilian György, ipari tanuló iskola Ezperanto tanfolyam, Megyeri ut 45, Budapest IV Hungarujo.

Por restarigo de la movado en Germ. Demokr. Resp. mankas ĉ. elementaĵoj (Radikaro kaj ties kompletigoj, Plena Vortaro k.s.). Kiu povas helpi? Rekompenco eble estonte. C. Kessler, Kieler Str. 28, DRESDEN-KLOTSCH.

Kontraŭ lernolibroj de gitaro kaj mandolino mi sendas la famajn hungarajn

poŝtmarkseriojn. Adreso: Prof. László Izsó, Budapest VIII, Rezerédi-utca 10.II. 22, Hungarujo.

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien
kun kunlaborado de
la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - poŝformato
jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn:

En Francujo: R. Fiquet, Poŝta
konto 2259-98 Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj
landaj Perantoj de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: Administracio:
7, Av. Léon-Gourdault 5. Bd. Stalingrad
Choisy-le Roi (Seine) Nice (A-M)
Francujo.

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam